

EL POPOLO ĈINIO


人民中國報道



6

1958





ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO



ĈINIO IMPETAS EN ŜTALPRODUKTO

por produkti 10,700,000 tunojn da ŝtalo en 1958

1. La Fer-ŝtala Kompanio de Anshan klopodas superplenumi la jar-produktan taskon de 4,500,000 tunoj da ŝtalo.
2. Centoj da malgrandaj altfornoj nun konstruiĝas en la tuta lando. Jen finkonstruiĝas post 45-taga laboro nova altforno 45-kubmetra en la Dua Ŝtalfabrika de Kunming, Yunnan-provinco.
3. La dua altforno de Handan-ŝtalfabrika en Hebei-provinco tuj finkonstruiĝos.
4. La fama vinprodukta urbo Shaoxing nun viglas ankaŭ en produkto de fero kaj ŝtalo.
5. Ankaŭ la malgranda Bessemer-forno de la Maŝinfabriko Kooperativo de Yangquan kontribuas al pliprodukto de ŝtalo.
6. La Fer-ŝtala Kompanio de Wuhan, la dua ferŝtala bazo de Ĉinio, konstruiĝas tage kaj nokte, kaj ĝia unua altforno jam elfluigadas ferfluon.



AL LA LEGANTOJ

JAM venas la unua datreveno de la reapero de nia gazeto. Ĉu ni plenumis nian devon? Ĉu ni kontentigas niajn legantojn? Pravajn respondojn povas doni nur niaj karaj legantoj. Tial ni esperas, ke niaj legantoj ofte donos al ni siajn opiniojn por ke ni plibonigu niajn laborojn. Jam multaj el la legantoj sendis multajn valorajn kritikojn kaj proponojn per la enketlisto de nia redakcio. Tre alte ni taksas tiujn kritikojn kaj proponojn kaj serioze kaj dankeme ilin traktos. Ĉar ni scias, ke tio koncernas ne nur la plibonigon de nia gazeto, sed ankaŭ pluan prosperon de la Esperanta movado. Kaj senpaciencie ni atendas ankaŭ la opiniojn de aliaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne resendis la liston.

Kiam materialoj de tiu ĉi numero estis pretaj, la Usonaj imperiistoj denove faris militan minacon en Taiwan-markolo por fabriki streĉan atmosferon kaj klopodi disvastigi sian invadon al la insuloj Jinmen kaj Mazu ĉe la marbordo de Fujian-provinco, kio maltrankviligas la tutmondajn pacamantojn. Ni ne povas nin deteni de indigno kaj forte protestas kontraŭ tio.

Ni estas esperantistoj. Ni amas pacon. Tamen same ni amas ankaŭ nian patrolandon. Al kiu

lando apartenas la insulo Taiwan? Tio estas klara kiel la suno. La loĝantoj en Taiwan estas civitanoj de Ĉinio kaj Ĉiang kaj-šek estas nur forpelita perfidulo de la ĉina popolo. Ankaŭ tio ne bezonas ian klarigon. Kovata de la Usonaj imperiistoj Ĉiang Kaj-šek okupas la insulon Taiwan kaj entreprenis diversajn detruajn agadojn al la ĉina kontinento. Lasttempe, post kiam la Usonaj imperiistoj komencis militan intervenon al la arabaj landoj, la detruaj agadoj de Ĉiang Kaj-šek pli furioziĝis. Ĉu tio estas tolerebla al la ĉina popolo? La ĉina popolo havas plenan rajton doni solidan baton al la bando de Ĉiang Kaj-šek restanta sur la insuloj Jinmen kaj Mazu kaj preni necesajn militajn paŝojn, kaj liberigi sian propran insulon Taiwan laŭ konvena maniero kaj en konvena tempo. Tio ja estas afero tute propra al ni mem kaj neniel koncernas al Usono, kiu situas pli ol dek mil kilometrojn malproksime. Kiel oni povus aserti ke tio minacas al Usono? Ĉio ĉi tio ja ankaŭ estas tre klara kaj necesas nenia klarigo. Tamen el niaj legantoj eble ankoraŭ ne ĉiuj bone scias la historion pri Taiwan. Tial en tiu ĉi numero ni presis artikoleton pri Taiwan en la kutima rubriko pri ĉina historio. Ni esperas, ke tio iom helpas al niaj legantoj.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo — Ponto (Gravuris Li Qian-xiang)

Popola Komunumo

La Posteuloj de Gan Jiang

Kvar Knabinoj — Dek Fabrikoj

Juna Kreanto de Mirakloj

La Sekreto de Ujgura Maljunulo

Ekstarintaj Homoj

V. Eroŝenko — Rusa Amiko de Lu Sin

Du Poemoj de Maŭ Ze-dung

La Deveno de Konvolvulo

Patrino Needziniĝinta

Disflorado sur Pekina Sceno

Bildo sur la dorsa kovrilo — Noktomezo (Lignogravuraĵo de Jia Yi-qun)

La ĉina popolo estas pacama. Sed se la Usonaj imperiistoj daŭrigos la invadon kaj intervenon al Ĉinio kaj devigos nin al milito malgraŭ pluraj avertoj de la ĉina popolo kaj la pacaj deziroj de la tutmondaj popoloj, tiam por defendi la fruktojn de nia paca konstruado, la ĉina popolo ja ne timas militon. Ĉar kompromiso kaj submetiĝo al la invadistoj nenion helpas al la konservo de la paco. Pri tio ja ĉiuj nacioj batalantaj por sendependeco de la imperiismaj jugoj havas siajn proprajn spertojn. Ni kredas, ke la vero ĉiam brilas antaŭ ĉies okuloj kaj ke niaj karaj legantoj ĝin klare vidas.

En tiu ĉi numero krom ekzemplojn de amasa movado en entrepreno de malgrandaj fabrikoj sub la politiko de samtempa disvolvo de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj kaj en entrepreno de teknika plibonigo sub la politiko de teknika revolucio, ni ankaŭ mallonge konigas al niaj legantoj pri la popola komunumo, la nova formo de baza socia organizo. Ĝi estas unu el la plej grandaj kaj epokfaraj ŝanĝoj en Ĉinio kaj ni intencas fari pli detalan informon estonte. Eble tio interesus niajn legantojn.

La Red.

POPOLA KOMUNUMO

MI konsideras kiel feliĉon mian viziton al la Popola Komunumo "Sputniko" en Suiping-gubernio, Henan-provinco. En la komunumo ĉie regas entuziasmo kaj fervoro; ĉiuj membroj sintenas en alta spirito kun ĉielotuŝa energio por laboro. Sub brilaj radioj de la leviĝanta suno ili antaŭen marŝas al komunismo kun alte levita kapo per firmaĵoj, longaj paŝoj.

Ĉi tie tiel abundas laŭdindaj aferoj, ke ne estas eble finrakonti ĉiujn. Mi povas nur priskribi pri kelkaj punktoj por niaj legantoj.

Ĉi tiu komunumo formiĝis el 27 agrikulturaj kooperativoj kaj havas 40 mil membrojn.

Fariĝinte popola komunumo, la organizaĵo ne plu restas simpla organizaĵo por agrikultura produktado, ĝiaj funkcioj multe plimultiĝis. Vere, en la komunumo ĉiu estas kaj laboristo, kaj kamparano, kaj komercanto, kaj lernanto kaj soldato — kvin en unu; ĝia funkcio estas ĉiufanka kaj ĉioninkluziva: politika, ekonomia, kultura kaj milita. Ĝia strukturo tre similas al eta "ŝtato", ekz., en ĝi estas diversaj fakoj de industrio, agrikultura tekniko, financo kaj ekonomio, kulturo, edukado kaj higieno milita afero kaj defendo, ankaŭ arbar-kulturo, akvokonservado, bredado, komuniko k.t.p. . . . dekelkaj entute; ĝi eĉ havas sian propran "Fremdaferan Fakon", kaj sendas al aliaj komunumoj "ambasadorojn" por plifortigi interrilaton kaj kunlaboron inter la komunumoj kaj intersanĝi spertojn.

En la riĉprodukta rizkampo

Foto de Wang-Chun-de




Ĝia nomo "Sputniko-komunumo" devenas de tio, ke ĉi-somere ĝi elpafis "sputnikon" de alt-produkto tritika. Ĉi-somere, la komunumo rikoltis entute pli ol 40,000,000 ĝinojn da greno. Ĝojo pro la riĉa rikolto plenigas komunumon. La partia sekretario k-do Chen Bing-yin tiel ĝojas, ke li ne povis bone dormi nokte ekde la tritika rikolto. Lia vizaĝo brilas de ĝojo kiam li renkontiĝas kun aliaj. Antaŭe, en ĉi tiu loko tritikan manĝaĵon oni ne povis longe ĝui eĉ post la rikolto tritika, sed ĉijare la tritika faruno estas super-abunda. Komunumanoj diras: "Nun la problemo ne estas nesufiĉo de greno, sed nesufiĉo de spaco por konservi la multegan grenon. Vere, la 20-a produkto-brigado de la komunumo eĉ ne havas konstantan manĝejon, ĉar ilia manĝejo jam uziĝas kiel konservejo de greno.

La riĉa rikolto plue liberigis ĉies penson. Sur la bazo de ĉijara abunda rikolto de tritiko, iuj anoj planas altigi la po-muan tritikan produkton ĝis pl ol 10,000 ĝinoj en la venonta jaro; aliaj planas altigi produkton de rizo de 10,000 ĝinoj ĝis 50,000 ĝinoj; ankoraŭ aliaj estas pretaj altigi la produkton de batato de 400,000 ĝinoj ĝis 600,000 ĝinoj po muo. En unu kampo por batato la komunumo plugis la teron ĝis 12 futoj profunde. Ili enmetis po tavolo da sterko je ĉiufuta profundeco. Ĉu ankoraŭ estas strange, ke kreiĝis miraklo de alta produkto en tia kampo?

Post starigo de la komunumo, la labororganizo pliefikiĝas kaj fortiĝas. Unu matenon, kiam mi vizitis la kampojn de la komunumo, mi renkontiĝis kun trupo kun erpiloj surŝultre, kiu kantante marŝis per laŭtaktaj paŝoj al peco da verdverda rizkampo. Alproksimiĝinte, mi pridemandis kaj sciiĝis, ke ĝi estas produkta brigado de Sputniko-komunumo speciale organizita por prizorgo de rizprodukto. Nun la plibone organizitaj terkulturistoj fariĝas pli rapidmovaj, pli viglaj kaj pli gajaj; kaj la produktado plialtiĝas. Nun en Sputniko-komunumo estas dudek mil tiaj brigadanoj, kiuj ludas rolon de pioniro kaj sturmtrupo. Antaŭe regis tia opinio, ke kamparanoj estas "sendisciplinaj" kaj "malprogresemaĵoj", sed la novtipaj kamparanoj jam estas disciplinaj laborantoj, bone organizitaj.

Preskaŭ ĉiuj anoj de Sputniko-komunumo manĝas ĉe la komuna manĝejo kiu disvolviĝis el la provizora manĝejo dum la okupata sezono en la



**Je voko de klariono tuj kolektiĝas
komunumaninoj por laboro.**

Foto de Wang Chun-de

kamparo. Gustuminte la dolĉon de la provizora kolektiva manĝejo en la somero, oni verkis *kŭajban-on* (versaĵo por deklamado kun bambua klakilo) por ĝin prikanti:

La manĝejo tre bonfara,
je provizo tre tre ŝpara,
da nutraĵo plena dono,
tamen por malmulta mono.
Mastrumadon ĝi simpligas,
produktantojn plimultigas;
rapidiĝas nia movo,
pligrandiĝas grenkrepevo.

Precipe la virinoj, kiuj liberiĝis el la kuirejo kaj povas partopreni produktadon ĝin laŭdas kun pli da ŝato. Sekve oni decidis fondi konstantan komunan manĝejon. Proksimuma kalkulo montras,

ke post la starigo de la komuna manĝejo, la ŝparita laborforto egalas al pli ol 4,000 laborantoj.

La aŭtune rikoltita greno de Sputniko-komunumo ne plu estos distribuita laŭ labortagoj, sed laŭ la nombro de membroj. Ĉiu membro ricevos sian difinitan porcion da greno. En la komunumo efektiviĝos salajra sistemo post la aŭtuna rikolto. Krom fiksita porcio da greno, ĉiu membro ricevos difinitan salajron laŭ sia laborpovo, tekniko en produktado, kaj sinteno al laboro. Nun ĉiuj membroj atendas tage kaj nokte ĝian efektiviĝon, ĉar post tio ili fariĝos iom post iom membroj de la laborista klaso.


Post la aŭtuna rikolto en la komunumo enkondukiĝos sistemoj de senpaga kuracado kaj emeritiĝo. Tiam, malsaniĝinte, membroj povos ricevi kuracadon kaj medikamentojn senpage kaj la senlaborpovaj gemaljunuloj povos eniri en la hejmon por aĝuloj.


Babilante kun k-do Zhong Qing-de, prezidanto de la komunumo, mi pridemandis kion plej bezonas nun la komunumo. Li diris: "Nenio mankas nun en nia komunumo, krom traktoroj. Vere estas tiel: la komunumo havas superabundon da greno memproduktita kaj ĉiu membro povas havigi al si meznombro 200 ĝinojn da porkaĵo por la kuranta jaro. En la venonta jaro, ĉiu ankaŭ rajtos ricevi poĵare 24 ĝinojn da vegetaĵa oleo, 30 ĝinojn da sukero, 100 futojn da ŝtofo kaj potaĝe unu ĝinon da frukto. Krome, la komunumo jam planas konstruadon de loĝejoj por la membroj, pluretaĝa oficeja domo por la administracia komitato, klubo, lernejoj, infanvartejo, kinejo . . . kaj tiel fari la komunumon granda ĝardeno.

Por la membroj de la komunumo la tagoj post la aŭtuna rikolto estos tempo de ĝojo kaj feliĉo. Ili bonvenigas la alvenon de tiu tempo kun vigla spirito kaj per streĉa laboro.

Jen konstruiĝas akvokonservejo per la manoj de la komunumanoj

Foto de Wang Chun-de





En Henan-provinco jam konstruiĝis pli ol 20,000 tiaj altfornoj, kiuj povas produkti 1,500,000 tunojn da gisfero jare.

Foto de Tang Mao-lin

LA grandnombra apero de malgrandaj altfornoj en nia lando komenciĝis nur post kiam la Centra Komitato de 1' Ĉina Komunista Partio, elmetis la Ĝeneralan Linion de la Konstruado de Socialismo. Estas alvokite, ke oni "grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn industriojn entreprenu samtempe!" Kaj jen ĉie stariĝis unuj post aliaj diversspecaj malgrandaj altfornoj, laŭ tipoj fremddevenaj, indiĝenaj kaj miksitaj.

Suzhou en Jiangsu-provinco estas la urbo, kie oni plej frue komencis konstrui malgrandajn altfornojn. Kaj estis interesa anekdoto pri la naskiĝo de la unua malgranda altforno tiea.

Kiel oni scias, Suzhou estas pitoreska loko, tiel ke oni diras: "Kiel la paradizo en la ĉielo, estas Suzhou kaj Hangzhou sur la tero." Sin trovas en Suzhou Huqiu-monteto, kie estas tiaj vidindaĵoj kaj romanecaj historiaj restaĵoj, kiaj "Spad-lageto" kaj "Spad-prova Ŝtonego" kiuj sin ligas al la legendo pri Gan Jiang, la fama antikva majstro de forĝado.

Post la liberiĝo oni trovis tie gisrubajon postlasitan de antikvuloj en sia ferreduktaĵo. Lokaj aŭtoritatuloj konfirmis, ke dum sufiĉe longa tempo deposed la liberiĝo, tieaj loĝantoj ankoraŭ serĉadis por trovi postrestantajn fornadaĵojn aŭ mineralojn, el kiuj ili povus elfandi metalojn.

Sed forpasis jam 2,500 jaroj!

En vintro de 1956, provizado de krudfero estis nesufiĉa. Pro tio la produktado de la Fabriko de Agrikulturaj Instrumentoj de Suzhou reduktiĝis kaj la laboristoj kaj maŝinoj fariĝis pliparte senokupaj. Ĉiuj estis en maltrankvilo.

Zhu Ji-fa, 30-jara laboristo de la fabriko, iutage ekskursis al Huqiu-monteto kun sia kamarado Zhou Bao-yu, kaj venis al la Spadprova Ŝtonego. Ili rimarkis, ke la ŝtonego krevis en la mezo per rekta

fendo. La gvidisto klarigis, ke sur la ŝtonego Reĝo He-lü de Wu-regno iam provis la spadon, forĝitan por li de Gan Jiang. Kiel akra spado ĝi devis esti, ekpensis ili ambaŭ.

Alproksimiĝinte al la Spad-lageto, ili trovis ĝin plena de profunda bluverda akvo, kies fundo estas tute ne travidebla. La gvidisto sciigis al ili, ke tiu estis la lageto, en kiu Gan Jiang hardis siajn spadojn.

Fang Ji

La Posteuloj

— Pri la naskiĝo de la unua

Tiam Zhu Ji-fa ekpensis:

"Kial ni ne povus elfandi feron nun, se nia praŭlo povis forĝi ĉi tie spadon antaŭ pli ol 2,000 jaroj?"

Tiu penso rapide estigis en li ardan ambicion—elfandi feron! Jes elfandi feron!

Kaj li diris tion al sia kolego Zhou Bao-yu, kiu estis ankaŭ tuj altirita al tiu nova ideo. Perdinte jam la emon ĝui pejzaĝon, la du rapidis returne por ĉie pridemandi, ĉu ie ĉi tie sin trovas fermino.

Troviĝas ja fermino en Suzhou, en Yang-monto, kiu situas nemalproksime de la urbo, sudokcidente. Sed la problemo estas, kiamaniere oni povas redukti feron el kruda minaĵo.

La nesufiĉecon de ferprovizado jam priatentis la provincaj aŭtoritatuloj kiuj aŭdinte ke estas ankoraŭ aplikata la indiĝena metodo de gisado inter la popoloj de Ebian, Sichuan-provinco decidis sendi delegacion por tie studi la aferon.

Zhu Ji-fa estis nomita unu el la delegitoj. Sed la gvidanto de la delegacio estis iu inĝeniero Pan, kiu havis absolute nenian fidon je la indiĝena metodo de gisado.

Veturinte longan distancon trans riverojn kaj montojn, ili finfine atingis Ebian. La gisfornoj, kiujn ili vidis, estis efektive tre "indiĝenaj", tre simplaj. Ili estis nenio alia ol malgrandaj fornoj konstruitaj per brikoj kaj argiloj sur montodeklivo. Utiligante la deklivon, oni fiksis transiran tabulon por enigi minojn en la fornon.

Per tio la popoloj de Ebian reduktas feron. Sed eĉ ili mem ne scias, kiom longe tiu metodo de gisado transdoniĝis de generacio al generacio.

Memkompreneble inĝeniero Pan tute ne aprobis tiun metodon, opiniante, ke ĝi estas unue nescienca, due tro danĝera. . .

Tamen en la menso de Zhu Ji-fa ĝi elvokis tute alian reagon: Tiamaniere oni ja elfandas feron! En li estiĝis memfido.

Krom la indiĝena metodo, Zhu trovis tie alian mirindaĵon, kio despli firmigis lian fidon.

Li rimarkis, ke la popolanoj de Ebian ne nur gisas feron, sed ankaŭ forĝas ŝtalon laŭ sia indiĝena metodo. Ili ardigas la gisajon kaj marteladis ĝin sur amboso ĝis ĝi fariĝas altkvalita ŝtalo.

de Gan Jiang

malgranda altforno en Suzhou —

La nomo de tiu ŝtalo estas "Su-ŝtalo".

"Su-ŝtalo?" demandis Zhu Ji-fa kun mirego, "Kial ĝi estas tiel nomata?"

Oni klarigis al li: "Ĉar tiu ĉi forĝmetodo devenis de Suzhou en la antikveco."

Ĉe ekaŭdo de la klarigo, Zhu tute raviĝis en ekstazo—la inspiro, kiun li ricevis de Gan Jiang, sin trovas ja ne nur en legendo, sed ankaŭ en reala vivo.

Ĉio ĉi tio, kio profunde impresis kaj kortuŝis Zhu Ji-fa, fariĝis motivforto por kreado al la laborado. Sed al la intelektulo inĝeniero Pan la afero estis tute alia. Reveninte al Suzhou li tute neis la valoron de la indiĝena metodo de ferreduktado kaj ne permesis al la Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Suzhou gisi feron laŭ la metodo lernita el Sichuan.

Kompreneble Zhu ne aŭskultis lian admonon. Raportinte al la gvida instanco, kion li vidis en Sichuan, Zhu prezentis sian proponon, ke la fabriko tuj konstruu indiĝenan altfornon, kiu estas tiel

malgranda, ke ĝia interno ampleksos nur 0.9 kubmetron. La gvida instanco akceptis lian proponon favore kaj donis al li plenan subtenon.

Tiel en januaro, 1957, la unua malgranda altforno starigis en la Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Suzhou.

Tiu forno estis konstruita sur la bazo de la antaŭa fandforno en la fabriko. Ĝian eksteraĵon konsistigis gasolen-cilindro kaj anstataŭ uzi brikojn oni stukis la internon per dika tavolo da argilo.

Tiamaniere la unua forno da fero en la moderna historio de Suzhou estis elfandita.

Sed samtempe, la forno mem estis ankaŭ fandita.

La duan fojon ili konstruis fornon per fajrobrikoj. Ĉar ili ne havis sperton, la forno ne estis bone konstruita. Dum funkciado flamoj eliĝis multloke el fandaĵoj. Do post la elfando de forno da fero la gisado refoje ĉesis.


En la sinsekvaj provoj estis sukcesoj kaj malsukcesoj, spertoj kaj lecionoj. Sur la bazo de tiu paŝo-post-paŝa eksperimentado ili finkonstruis 8-kubmetran altfornon, kiu povas gisi ĉiutriore unu fojon kaj produkti 12.5 tunojn da fero ĉiutage.

Ne atendite ili ricevis de tiam multajn vizitantojn el ĉiuj anguloj de la lando, inkluzive la delegacion el tia granda kaj fama Anŝan-ŝtalarbo.

Nun la unua malgranda forno jam ne plu ekzistas. Ĉe la loko staras unu 8 kubmetra kaj du 15-kubmetraj fornoj. Kiam mi vizitis la fabrikon, la fornoj estis funkciaj. La fabrikestro diris al mi, ke por kontentigi la vizitantojn, ili intencas restarigi la unuan malgrandan altfornon, kiel modelon. Ilia nuna intereso turniĝas al pli grandaj altfornoj kaj Martin-fornoj. Li diris: "Suzhou devas havi sian pezan industrion. Kial ne? Ni ja havas minon, laboristojn... Jam en la antikva tempo nia praulo kapablis produkti Su-ŝtalon per kiu li forĝis la historie famajn spadojn. Ni devas superi la antaŭulojn, por esti indaj posteuloj de Gan Jiang."

FERA FLUO

Pentris Miao Di



Kvar Knabinoj — Dek Fabrikoj

LA personaro de Baidi-a Virina Disvendejo, Sichuan-provinco konsistas el 4 knabinoj. Ili estas Ou Yong-lan, Fu Dao-lan, Rao Zhi-gui kaj Chen Da-ying. La 27-jara, plejaĝa Ou Yong-lan estas la direktorino. Ŝi estas rapidmova kaj urgema; ŝi laboradas senripoze kaj impetas spitante ĉiajn malfacilaĵojn. Pro tio la koleginoj nomas ŝin "Pulvo-direktorino". La plej juna estas Chen Da-ying, kiu plej ŝatas kanti. Oni ĉiam trovas gajecon tie kie ĉeestas la malgranda Chen. Tial oni nomas ŝin Fraŭlino Pigo. Do la vivo kaj laboro en la vendejo iras efektive kun streĉeco kaj vigleco.

Post la publiko de la Ĝenerala Linio de Socialisma Konstruado, en unu mallonga monato ili starigis ĉirkaŭ sia vendejo 10 malgrandajn fabrikojn, kiuj aperis kvazaŭ el artfajraĵo: hodiaŭ fabriko de sodakvo morgaŭ tiu de aroma oleo, k.t.p.

Du Pampelmaj Ŝeloj

Reveninte de la kunveno ĉe la lerninda Qili-a Disvendejo, la "Pulvo-direktorino" ekdemandis sin kiel ŝi partoprenu en la tutpopola entreprenado de industrioj, sed trovis nenian orientiĝon malgraŭ longa cerbumado. Ĝuste kiam ŝi embarasiĝis, ŝi vidis du pampelmajn ŝelojn sub la vendotablo kaj ekpensis en si ke bongustaj estas pampelmoj, ĉu ne estas utiligeblaj iliaj dikaj ŝeloj. Pensante ŝi ekprenis du uncojn da sukero kaj lavpuriginte la ŝelojn ekprovis manĝi ilin kun la sukero. Sed fi, ... tre maldolĉe gustas la ŝelo. Ju pli ŝi maĉis, des pli

ĝi pikis al la lango, kaj daŭre elfluis la maldolĉa salivo el ŝia buŝo. La preterpasanta maljuna onklino Li konjektis ke la direktorino malsanas kaj bonkore venis ŝin pridemandi. Ou Yong-lan svingis la manon, respondis nenion sed nur forte forĵetis la ŝelon kun grimaco. Ek-komprenis la maljuna onklino Li, kaj rigardante la pampelman ŝelon ŝi ekdemandis:

"Pro kio vi manĝis ĝin?"

"Mi provis produkti el ĝi sukeraĵon."

"A, por fari sukeraĵon!" ridis onklino Li, "Ĉu ne estas sukeraĵisto tiu Wei Li-shu, en nia kooperativo? Kial vi ne petis lian helpon?"

La ideo plaĉis al la "Pulvodirektorino", ŝi tuj rapidis al la majstro por lerni la metion. Ili tremis pampelman ŝelon en akvon, kiun ili ĉiutage ŝanĝis unufoje. Post kelkaj tagoj, la ŝelo ne plu maldolĉas, kiam ili ree gustumis ĝin kun sukero. Tio ĝojigis la "Pulvodirektorinon" tiom multe, ke ŝi tien ĉi tien kuradis por ke oni ĝin gustumu. Dum la gajado Fu Dao-lan sugestis fabriki sukeritajn oranĝŝelojn kaj palmo-semojn, kaj la malgranda Chen proponis utiligon de spik-internaĵo de maizo. Tiel ili entute elprovis utiligon de pli ol dek sovaĝaj kreskaĵoj kaj senutilaj materialoj en fabrikado de pli ol 40 specoj da sukeraĵoj, kaj fondis la unuan fabrikon — Fabriko de Sukeraĵoj. Kaj ili faris sensacion en la gubernio per malfermo de Vendejo de Sukeraĵoj el Sovajaĵ Kreskaĵoj.

La Knabinoj ne Haltis post la Unua Sukceso

Tamen la knabinoj strebis por superi la Qili-disvendejon kaj ne kontentiĝis pri la unua sukceso. En tiu tempo Cui Ji-si de la Distrikta Kooperativo revenvoje atingis Baidi-disvendejon post lernado en Yichang. La knabinoj retenis lin ĉe si por lerni teknikon de li. Lao-Cui* aĉetis en la gubernia urbo ferrubon kaj sulfuracidon por ekprovi la fabrikadon de ferozo sulfata. En la vespero, li alportis grandan petrolujon por ĝin uzi kiel kaldronon. Malgranda Chen alportis 4 sitelojn da akvo. La knabinoj ĉiuj sindonis por efektivigi la eksperimenton.

Ou kaj Lao-Cui gardis la "kaldronon" sendorme. Je la tria horo nokte ŝi demandis Lao-Cui-on: "Kiom da tempo ni devas ankoraŭ atendi?" Kaj li enmetis termometron en la kaldronon kaj eltirinte ĝin li rigardis kaj diris: "Ne malspacienca, ni ankoraŭ devas iom atendi." Ĝis kiam kokoj kriis la trian fojon, la steloj brilis malpli forte kaj proksimiĝis la krepusko, fine pretiĝis la preparado. Nun estas vico por filtrado, gutoj de nigra likvaĵo senĉese falas de la tolsako. Sed la unua rezulto ne estis kontentiga, malhela estis la koloro kaj



malgrandaj estis la kristaloj. Tuj sekvis la dua provado, kiu estis fundamente sukcesa. Tiel naskiĝis la dua fabriko, kaj simile ankaŭ estiĝis la tria, la kvara. . . .

Al ili tiam alportis kun gongado kaj tamburado Baidi-a Agrikultura Kooperativo ruĝan flagon kaj opini-afiŝon, sur kiu skribiĝis:

En nia Baidi-a disvendejo,
Laboregas sole kvar knabinoj.
Se vi pensas, ke ne tiel lertaj
Kiel viroj estas la virinoj;
Konvinkiĝu per okuloj spertaj,
Kion ili faris jam ĝis nun.
Dek fabrikoj ĉirkaŭ la vendejo,
Kiel la planedoj al la sun'
Ĉar por pliriĉigi la popolon,
Ili havas fajre ardan koron.

Malamita la Konservativismo

Multaj rigardantoj kaj esplorantoj amase venadis viziti ilin, iuj el malproksimaj lokoj kaj aliaj el grandaj urboj. Iutage "Pulvo-direktorino" starante antaŭ la disvendejo montris iun dometon al vizitanto: "Jen estas nia fabriko de aroma vegetajoleo." "Ĉu vere?" iu el ili diris nekredeme, "Aroma oleo estas ja varo altvalora." "Jes," respondis la direktorino ridante, "ĉu plaĉas al vi iom pririgardi?"

"La fabriko estas konstruita sur la spaco sub la tegmenta rand-elstarajo de domo de iu kooperativano." La gastoj estis iom mirigitaj de ŝia klarigo kaj ŝi daŭrigis la prezentadon pri la ekipaĵoj kaj produktaj procedoj. Fine ŝi alprenis botelon da likvaĵo kaj montris al la gastoj: "Jen estas nia fabriko." La dubemulo transprenis la botelon, ĝin pririgardis ĉiuflanke, kaj videble lia pensado ankoraŭ ne sin liberigis ĝis nun de konservativaj opinioj. Li fine ĵetinte ekrigardon al la direktorino, detiris la boteloŝtopilon por konvinkiĝi per la propra nazo. Kaj nur tiam li konvinkiĝis.

Apud ĉi tiu fabriko estis tiu de kupro sulfata. Sur la maldekstra flanko de la pordo oni povas legi sur paperrubando "Prilaborejo de Kupro Sulfata". Tio ne malpli mirigis la dubemulon, kiu tute ne atendis ke ili povas produkti eĉ tian ĥemiaĵon.

Kiam foriris la vizitantoj, oni legis el la notlibro de opinioj: "Post la trarigardo de la fabrikoj starigitaj de la knabinoj, kiuj produktas altkvalitajn kaj valorajn kemiaĵojn mi povas nur ĝisfunde forjeti kaj cindrigi miajn konservativajn pensojn en la fornoro de via fabriko. Mi nepre tuj ekagos post mia hejmvreveno por vin kuratingi." La skribinto estis certe neniu alia ol la dubemulo.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

"OSTORODADO DE FORMIKOJ"

Jen nova termino nekomprenebla. Nur antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi vizitis la maŝinfabron "Nord-oriento" mi ekkomprenis, ke ĝi estas nova metodo en maŝinfabrika industrio.

Tiu ĉi termino signifas uzi unu aŭ plurajn malgrandajn maŝinojn, specialajn instrumentojn por prilabori samtempe unu grandegan maŝinpecon en ĝia fabrikado. La tuta spektaklo similas al aro da formikoj rodantaj ostopecon. Ĝuste pro tio la laboristoj alprenis la originalan terminon por tiu labormetodo.


En la nomita maŝinfabriko mi vidis gigantan maŝinon jufabrikitan de la laboristoj laŭ tiu ĉi metodo. Ĝi estis maŝino por produkto de kemiaj sterkoj — altprema gaskundensiga maŝino por nitrogeno kaj hidrogeno. Oni opinius, ke ĝi estas prilaborita per grandtipaj maŝinoj.

Sed mi propraokule vidis, kiel 4 malgrandaj speciale faritaj torniloj laboris kiel vespoj aŭ sur aŭ interne de la cilindroj, kaj fine ilin pretigis.

Apud alia granda maŝinpeco de la gaskundensiga maŝino mi longe restis. Tiu ĉi maŝinpeco kun stranga formo longis je 4.9 metroj kaj pezis pli ol dek mil kilogramojn. Ĝin prilaboris du specialaj maŝinoj. Unu el ili sin ŝovis en ĝian internon; kaj la alia kapablas torni, bori, ebenigi kaj prilabori ĉu vertikale, ĉu horizontale. Tamen la plej interesa estis alia speciala maŝino nomata "fluganta satelito". Ĝi povas labori ĉie, jen sub la granda maŝinpeco, jen ĉe ĝia piedo.

Anstataŭ grandtipajn komplikajn maŝinojn, oni uzis entute 19 tiajn specialajn maŝinojn en 7 specoj por produkti la gaskun-

densigan maŝinon kun pezo de 182 tunoj. Laŭ aserto de vicministro de Maŝinindustria Ministerio tiu ĉi metodo estas aplikbla ankaŭ al la fabrikado de grandtipaj elektraj maŝinoj kaj maŝinaroj por ŝtalo-rulpremado. Ĝia plua evoluigo certe helpas al la solvo de la fabrikado de grandtipaj ekipaĵoj kaj ĝi montras al ni novan kaj gravan direkton por konstruado de peza maŝin-industrio de Ĉinio.



EN verko pri ĉina historio troviĝas noto pri la t.n. "feliĉa rizplanto" kun naŭ spikoj kiu aperis pro la ideala regado de la suvereno. Sed tio estas nur flataĵo de altrangaj feŭduloj al la imperiestro, kaj fakte neniŭ iam tion vidis. Sed nun vere kreiĝis mirindaj novaj specoj de rizo el la manoj de Jiang Shao-fang, junulo de Yulin-gubernio, Guangxi-provinco, en la mallonga eksperimenta periodo de 1955 ĝis 1958!

Jiang Shao-fang estas junulo nur 20-jara. En liceo li lernis nur dum unu jaro kaj duono, havas nenian honoran titolon de instruisteco, kaj eĉ ne ellernis la elementan algebron. Li diris al ni, ke algebraj ekvacioj ankoraŭ tre ĝenas lin. Sed ĝuste estas li, kiu faris grandan kontribuon kaj aldonis novan brikon al la naturscienco. Per apliko de la teorioj de Darwin kaj Miĉurin kaj dank' al pena studado kaj laborado, kuraĝaj revado kaj eksperimentado, fine li sukcesis akiri unuajn hibridojn kruciginte la rizon kun maizo kaj rizon kun sorgo, kaj per plua kompleksa krucigo jam sukcesis riĉigi kaj firmigi la heredan fundamenton de la nova speco.

Qin Si:

Juna Kreinto de

Jam en la jaro 1955 Jiang Shao-fang ekrevadis: Ĉu estas eble kreskigi la rizplantojn plurspikaj? Se tio efektiviĝus, kiel grandan signifon tio havus por la socialisma konstruado de nia lando! Tiam li estis laboristo en la eksperimenta ĝardeno de la Seminario de Yulin, kaj li komencis kuraĝajn eksperimentojn per senseksa krucigo—greftado de rizplanto kun maiz-planto, kunligate kun sia ĉiutaga labortasko. Sed en la komenco, kion li rikoltis, estis nur fiaskoj kaj moko. Rizo kaj maizo estas monokotiledonoj, kaj preskaŭ ĉiuj koncernaj verkoj asertas, ke ili estas nekrucigeblaj sensekse pro tio, ke ili ne havas kambiumon*. En la komenco, du instruistoj de botaniko kunlaboris kun li en la

KNABO VENDANTA ĴURNALOJN

Daò-anh-K'ha

*Ĉi matene la urbo sur sin portas ruĝajn
koltukojn*

*La disaŭdigiloj antaŭenpuŝas ilin la etulojn
Mi vidas Alĝerion*

*trans miloj da brakaj aloj
trans milionoj da koraj aloj
disflugadi tra ĉiuj Hanojaj stratoj*

Jen knabo ronda bela alvenas solenaspekte

La lipoj ridetante, invitadas delikate:

—Númeron por mi vi aĉetu!

Per numero Alĝerion vi subtenu!

En liaj okuloj kristalaj

Ekvidas mi Alĝerion

*heroan lin—mem starantan
la frunto larĝa makula je sanga ŝpruco
la brako malgrasa ĉirkaŭpremata de ŝirita
flago...*

En lia brusto etega

*Ekaŭdas mi la junan koron bat-batanta
gut post gutoj la Alĝeran sangon plor-
ploranta...*

Ekemociiĝas mi, haste etendas mi moneron

—Ja, ja, donu númeron...

*Kaj li pluen iradas, sia hararo en laga vento
flirtadas.*

Kiel bela tia mono kiu

*baldaŭ ekflugos tra montoj kaj valoj
Transpasonte lerneajn altojn, riverajn pro-
fundojn, marajn vastojn,*

*Ĝis la Alĝeran marbordon alportonte la in-
fanajn dirojn*

Kiel viziton al liaj amikoj tiom foraj

Ĉi-matene, mia plej juna fratar'

Fervoreme

oferas tagon de or'

*Knabo la feliĉa iradas akiri sukceson
Saltetante sur la strato, la freŝnaskaj brak-
aloj etendante*

*prem-premas la ĵurnalon je sia flanko
prem-premas Alĝerion en sia koro!*

Mirakloj

eksperimentado, sed poste ankaŭ ili opiniis, ke nenio povos rezultiĝi el ilia klopodo, kaj sin retiris antaŭ la malfaciloj. Sed Jiang Shao-fang daŭrigis persiste la klopodadon, kaj post 62 fojoj da fiaskoj, finfine sukcesis je la 63-a provo. Li explore distranĉis trunketon de monokotiledono kaj trovis, ke estas konuseto proksime al la radiko. Li prenis tiun konuseton kiel greftan punkton kaj miraklo estiĝis. "Ankaŭ bambuo apartenas al la monokotiledonoj," li diris al ni kun rideto. "Ĉu ĝi ne elŝovas konuseton, kiam ĝia bambuido komencas elkreski?" Ĉar li ne trovis pretan terminon por ĝi en la libroj, li donis al ĝi la nomon "kreska konuseto". Lastatempe, kelkaj agronomiaj profesoroj vizitis lin kaj ekmiris aŭdinte tiun fremdan terminon, sed fine ili aprobis ĝin.

"Nun la konuseto jam povas esti tiel nomata, ĉar ankaŭ la profesoroj ĝin aprobis." Kiam Jiang Shao-fang tion diris al aliaj, li montris sentimenton kian havas patrino rememorante pri la nomado de sia novnaskita infano.

Samtempe li ankaŭ faris eksperimenton de seksa krucigo por ricevi hibridon devenantan de rizo kaj sorgo. Estas nefacila afero mortigi la stamenojn de rizo por ke ĝiaj pistilaj stigmoj estu fekundigitaj per poleno de sorgo. Sed Jiang Shao-fang, la plenumanto de tiu eksperimento estas nek profesoro nek teknikisto disponanta pri diversaj necesaj instrumentoj kaj aparatoj. Li ne havis eĉ termometron, kaj estas luksaĵo por li polen-peniko. Li do prenis pecon da riztigo senartika, prenis per ĝi iom da poleno de sorgo kaj ĝin blovetis sur la stigmojn. Por mortigo de la stamenoj kaj arta fekundigo oni bezonas horloĝon por kalkuli tempon. Kaj ne havante brakhorloĝon, li devis agadi laŭ la sonoradoj anoncantaj la finiĝon kaj komenciĝon de lecionoj; ĉar la interleciona paŭzo estas 10 minutoj, do li devis elkalkuli pli aŭ malpli longajn tempdaŭrojn en la koro.



Estas tre interese por Jiang Shao-fang tion rememori. "Eble mi ne povus sukcesi, se mi havus kompletan da bonaj instrumentoj. Ekzemple, bonkvalita kaj kara gluaĵo por fermi greftan punkton eble ne estas tiel taŭga por rapida kreskado de la greftaĵo kiel la riztigo kiun mi uzis por fiksi la greftaĵon. Tiel same, eble mi ne kuraĝus fari la eksperimentojn, se mi estus leginta pli multe da libroj asertantaj jen tion kaj alion neebblaj."

Nun la rizplanto hibridigita kun sorgo jam generis ĝis la kvina generacio. La tigo de la nova rizospeco dikas kiel la malgranda fingro kaj pli altas ol homo, ĉiu planto distigiĝas kaj disbranĉiĝas en 10 ĝis 20 spikojn havas pleje po 600 grajnoj. Mallonga estas ĝia maturiĝa periodo kaj granda estas ĝia produktokvanto. Laŭtakse, ĉiu muo povas produkti ĉ. 5,000 ĝinojn da rizo, kaj dufoje ĉiujare entute 10,000 ĝinojn (t.e. 750 kilogramojn po aro). Lastatempe, miloj da vizitantoj venis unuj post aliaj por intervui lin kaj pririgardi lian eksperimentan kampon. Inter la vizitantoj estas estroj de produktaj grupoj, estroj de agrikulturaj kooperativoj, sekretarioj de vilaĝaj partikomitatoj, studentoj, aktoroj, specialistoj kaj profesoroj.

Vastaj estas la interesoj de Jiang Shao-fang. Li neniel kontentiĝas je la atingitaj sukcesoj. Kontraŭe, li rigardas ilin nur kiel komencon. Nun sub lia eksperimentado kaj provkulturado estas pli ol ducent plantaĵoj, inter kiuj la kreado de frostrezistema transvintra rizo jam sukcesis, kaj tio solvos por suda Ĉinio la problemon de trifoja plantado de rizo en unu jaro. La valoro de tiu sukceso estas sendube grandega. Li intencas ankaŭ reformi arakison per krucigo por devenigi hibridon, kies legumenoj havus po 5-6 aŭ eĉ pli multajn grajnojn, kaj li havas grandan fidon pri tio. Li estas ne nur juna sciencisto, sed ankaŭ amanto de belarto. Li ŝatas pentradon laŭ ĉina klasika stilo kaj la arton de belskribo. Li povas tre bele manskribi. Sur liaj librobretoj oni trovas tradukaĵojn de "Origino de Specoj" de Darwin kaj verkoj de Miĉurin.

* *Histotavolo de frukto aŭ tigo formanta novan histon (cambium).*

Ou Lin:

La Sekreto de Ujgura


ĈIU-TAGE en frua mateno, maljunulo Aĵŝan silente forlasis la hejmon kun sia malgranda nepo rajdante sur malgranda azeno kaj revenis nur vespere. Lia filo Klim, ĉefo de la Progresita Agrikultura Kooperativo, jam vane pridemandis sian patron kaj filon multfoje pri la kialo. Iun tagon, li forlasis la kamplaboron dum duontago por ŝteli sekvaĉi sian patron, kaj finfine solvis la enigmon.

Je la komenco de printempo, disvastiĝis en Xinjiang-provinco grava novaĵo, ke la konstruata Lanzhou-Xinjiang-a Fervojo baldaŭ etendiĝos en tiun ĉi provincon, kaj la trafiko atingos Hami-n en aŭtuno ĉi-jare. Maljunulo Aĵŝan estis tiel ĝoja pro tiu informo, ke li ne povis endormiĝi dum la tuta nokto. En la sekvinta tago li veturis kun sia nepo sur azeno al la fervoja konstruejo. Oni gvidis la maljunulon ĉirkaŭrigardi la laborejon. Dum rondirado la maljunulo pensis: Tiuj ĉi junuloj alvenis de milojn da li-oj malproksime al Hami-gubernio forlasinte siajn gepatrojn kaj hejmojn, nek por oro nek por arĝento, sed nur por la bono de ni kvin milionoj da Xinjiang-anoj. Ili estas vere bonaj infanoj de Prezidanto Maŭ Ze-dung. Per kio do ni Xinjiang-anoj devas bonvenigi ĉi tiujn fervoj-konstruantojn? Gobio ja estas brula kiel fajro dum somero, kaj oni ne povas eĉ trovi ombron por sin ŝirmi. Kiel bone estus se ni povus ilin regali per niaj bongustaj Hami-melonoj. . . . La maljunulo ekdecidis en si kaj rapide reiris hejmen. Li kaptis sian filon je la brako kaj diris:

“Mi diras, Kliĉjo, kiel ĉefo de la kooperativo, ĉu vi pensis pri la neceso planti iom da melonoj por ili?”

Senĉese etendiĝas la fervojo en Xinjiang-provinco

Foto de Qi Guan-shan



“Por kiu?”

“Por la junuloj kiuj konstruas fervojon.”

Klim diris kun rideto: “Certe, la komitato jam diskutis pri la plano pligrandigi la plantan areon de melonkampoj je dudek muoj.”

“Bone! Ankaŭ enkalkulu min inter la plantantojn.”

“Vi?” ekmiris Klim. “Paĉjo, vi havas jam sepdek du jarojn!”

“Kio? kio?” La maljunulo pretis ekpreni la manon de sia filo por provi la brakforton. “Ĉu monta aglo kadukiĝos?”

Guo Xian-hong:

Ekstarintaj

TUJ antaŭ la reiro al sia hejmlando, iu fama konata maljuna specialisto, doktoro de fiziko el iu kapitalista lando sendis al nia fabriko longan leteron el Ŝanhajo por esprimi sian dankon. Troviĝis interalie en tiu letero la a paraĝTroviĝis

“Mi petas, ke la juna laborejestro kaj la diligentaj laboristoj pardonu la scienculon, kiu laŭdante la bonkvalitajn produktaĵojn iufoje dubis pri la lerteco de iliaj manoj, kaj pri la preciz-torniloj kiujn ili faris; kaj ankaŭ lin pardonu pro liaj maldecaĵoj rezultitaj el tiuj ĉi duboj. Refoje mi petas ilian pardonon kaj mi volonte portos al la popolo de mia lando la bonan impreson kiun mi akiris en Ĉinio.”

Mi finlegis la leteron ricevitan pere de mia ĉef-inĝeniero en la bruado de diversaj maŝinoj, kaj reaperis en mia kapo la mireganta mieno de la maljuna specialisto kiu vizitis nian fabrikon antaŭ unu monato.

Iun matenon, mi iris kiel kutime al la grupeto de elstampita peco, ne pro tio ke mi, kiel laborejestro, estas parteca al tiu grupeto, nek pro tio ke mi ankoraŭ sopiras al la maŝino kiun mi uzadis, sed tial ke laŭ mia opinio la elstampita peco estas unu el la plej gravaj pecoj de la elektrometro, la koro de la elektrometro; se mi ne vizitus tiun ĉi laborejon

Maljunulo

“... Estas ne grave kiu plantos la melonojn. Ĉu ne sufiĉas, se ni povos sendi melonojn al ili en aŭtuno?” Retropaŝinte Klim lin milde pacigis. “Kaj krome, ĉiuj plantantoj estas jam difinitaj, estas ne eble ŝanĝi” mensogis Klim.

La maljunulo ĵetis koleran rigardon al sia filo, sciante ke estas vane plue peti. La sola kaŭzo estas ke “paĉjo jam maljuniĝis”.

Ajŝan foriris de sia filo kun kolero, kaj komencis serĉi la maljunajn kamaradojn kun kiuj li kutime babilas, ludas kartojn en arbombro, aŭ dormas sur sternitaj surtutoj. Ili ĉiuj estas

maljunuloj fortaj kaj solidaj kiel maljunaj kverkoj, kiuj “malkontente” ĝuas sian emeritecon. La propono de Ajŝan estis varme akceptita. Ili forrajdis sur azenoj kun fosiloj. Post kelktaga esplorado kaj diskutado, kiel melonkampon ili difinis nekulturitan terpecon sep liojn for de la vilaĝo, facile akvumebla laŭ situo, kaj poste ili kolektis sufiĉajn melonsemojn. Do estiĝis nova melonkampo kiun eĉ la ĉefo de la agrikultura kooperativo ne sciis. La maljunuloj ĉiutage foriris de la hejmo frue kaj revenis malfrue. Kvankam tio kaŭzis suspekton al multaj, tamen ili estis fidelaj al siaj vortoj, tenante la sekreton ĝis kiam Klim sekvis sian patron al la melonkampo kaj malkovris ĝin. Li tiel kortuŝiĝis ke li ne povis sin esprimi per vortoj. Ŝajnis al li ke la vivegaj maljunuloj pli juniĝis, kaj antaŭ liaj okuloj aperis sceno de fervoj-konstruantoj manĝantaj bongustajn melonojn.

Homoj

almenaŭ unufoje ĉiutage, mi ne povus sidi trankvile en la oficejo.

Ĝuste tiam envenis renkonte al mi kelkaj gastoj en eŭropaj vestoj kaj akompanataj de la ĉef-inĝeniero.

Apud la ĉef-inĝeniero, iras maljunulo duonkalva kun eta liphararo. Li portis en la mano promen-bastonon, kaj de lia ŝultro pendis fotoaparato. Vidante tiajn ornamajojn, mi konjektis, ke li estas aŭ profesoro aŭ specialisto.

La ĉef-inĝeniero diris al la profesoro:

“Jen estas la estro de tiu ĉi laborejo.”

La sperto diris al mi, ke gastoj, kiuj vizitas la laborejojn akompanate de la ĉef-inĝeniero nepre estas fame konataj personoj kiuj kontaktiĝis kun la administracio de la fabriko jam antaŭ sia vizito. Mi etendis al li mian manon bonvenige.

Informiĝinte ke mi estas la estro de la laborejo, li malrapide forigis siajn blankajn gantojn, manpremis min malforte kaj retiris la manon. Lia mano, same kiel lia ringo kun diamanto, estis malvarma.

“De kie venis la profesoro?” mi pensis. “Li foriros post ne pli ol tri minutoj.”

Tamen li ne foriris tiel rapide kiel mi pensis. Li iris per taktaj paŝoj ne rapideme, observante la

diversajn maŝinojn importitajn el Budapeŝto kaj Leningrado, kaj kiam li atingis la maŝinojn fabrikatajn en Ĉinio liaj paŝoj fariĝis pli malrapidaj, kaj liaj okuloj atente rigardis al la maŝinfabrikiloj funkciantaj.

La elstampitaj pecoj en komplikaj formoj produktiĝas je la rapideco de du pecoj po sekundo. Lia rigardo sekvadis la rapidan manipulado de la laboristoj kun pli granda atento.

He! ĉu la profesoro precipe interesiĝas pri la maŝinoj fabrikataj en Ĉinio, kaj je tiu ĉi parto de la elektro-metro? Kiam mi tiel pensis, la profesoro ekklinis sin kaj atente observis; kaj la antaŭe mantenita promen-bastono estis metita sub la brakon.

“La laikojn interesas spektaklo, sed la fakulojn vera arto”. Li ne nur observis kun kompetenteco, sed eĉ aŭskultis la bruojn de la irado de la maŝino kaj la frapado de la stampmodelo.

“Tiel, 25,000 pecoj en ĉiu deĵoro?” demandis la profesoro iomete balbutante en dialekto simila al la Ŝanhaja kaj Nord-Gjangsu-a.

“Jes” mi respondis, admirante la ekzaktecon de la takso de la profesoro.

“Kia estas la tuta produkta kvanto de ĉiu modelo?” ree demandis la profesoro.

“Meznombro 800,000 ĝis 1,000,000.”

La profesoro ŝajnis kontenta kaj prenis unu el la elstampitaj pecoj ĵus faritaj kaj palpis ĝian randon. Li palpe mezuris la dimension de la dornoj kaj la neebenecon de la rando per la fingroj (oni ne kapablas fari tion sen sperto akirita dum multaj jaroj). Laŭ liaj movoj, oni povas aserti ke



Ilustris Zong Wei

li estas spertulo. Liaj “observado”, “Aŭskultado”, “palpado” estas ja ne simplaĵo. Estis do ne mirinde ke li sintenis tiel fiere.

“Kio estas la sekvanta procedo?” min demandis la profesoro formetante la elstampitan pecon kvazaŭ li estus ekzamenanta iun studenton.

“Kunnitado,” mi respondis, kaj pensis, “Kvankam sperta, tamen ja tro fiera.”

“Kunnitado sen lavado?”

Mi respondis: “Laŭ nia teknika regularo, estas ne necese lavi ilin, ĉar lavado estas tro teda, kaj konsumas multe da gasoleno. Se oni zorgas pri ilia pureco, la partoj ne makuliĝas de olea malpurajo.”

La profesoro dube skuis sian kapon kaj diris: “Permesu min vidi vian kunnititajn produktaĵojn.”

Mi iris kune al la kunnita maŝino. La suno jam alte pendis en la ĉielo. La sunradioj enpenetris tra la vitraj fenestroj kaj faris ŝtalobjektojn brilantaj. Ne atendante mian helpon li prenis unu el la ĵus kunnititaj kombinaĵoj; sed li ne tuj pririgardis ĝin, li malrapideme elprenis lupeon el sia poŝo kaj ferminte unu okulon ĝin pririgardis detale. Mia rigardo senkonscie renkontis tiun de la ĉefingeniero kaj mi trovis ke sur lia ridetanta vizaĝo nenia eksciteco troviĝis. La profesoro, observinte kelke da kombinaĵoj unu post la alia, forprenis siajn okulvitrojn or-kadritajn, kaj premante la manon de la ĉefingeniero diris tre ekscitite: “Ne atendite, ja ne atendite, la laboro estas tre bone farita.”

“Ĉu ankoraŭ troviĝas seriozaj difektoj laŭ via opinio?” demandis la ĉefingeniero.

“Ĉu la maŝino estas farita en Ĉinio?” La profesoro demandis mallaŭte, sed liaj vortoj penetris miajn orelojn kiel tondoro. La ĉefingeniero ĵetis sian rigardon al mi, kaj ne atendante lian respondon, mi diris montrante la maŝinon:

“Ĉu vi ne vidas sur ĝi la markon ‘La Maŝin-fabrika de Ŝenjang, Ĉinio.’”

La profesoro nek rigardis al la marko nek faris ian esprimon sed diris al mi sinturnante:

“Bone iras via produktado de elektrometro-pecoj ĉu kvante ĉu kvalite, tiu ĉi maŝino produktas bonege.”

“Ne, ni penas superi la produktojn de Westinghouse en Usono kaj FRANTI en Anglio.” mi diris.

Ŝajnas ke la profesoro havis novan dubon pri tio kion mi diris, tial mi desegnis laŭ mia kutimo per mia fingro, sur la tero ĝeneralan skizon de la planita plibonigo. La profesoro aŭskultis kaj kapjesis kelkfoje, estis videble, ke li konsentis kun mi. Kiam mi diris, ke post dek aŭ iom pli ol dek jaroj, li superos tiufланke Anglion, li subite min demandis:

“Ĉu vi estas inĝeniero?”

Mi kapneis.

“Ah, el kiu universitato vi diplomiĝis?”

“Mi neniam studis en ia ajn universitato, mi estis laboristo kaj nun promociita al la posteno de laborejestro.”

Tio, kion mi diris, ja estas ordinara, sed li estis tiel surprizita ke li silente rigardis min por longa tempo kvazaŭ en mi, maŝinejestro malpli ol 30-jaraĝa, troviĝas ia neimagebla mistero. . . . Kaj finfine sur la blanka kaj sulka vizaĝo aperis rideto:

“Dankon, la ĉina laboristo donis al mi profundan lecionon.”

Tion dirinte, li ĝentile klinis salute la kapon al la ĉefingeniero kaj eliris el la laborejo kaj la vizito tiel finiĝis.

Tio okazis antaŭ unu monato. La sekvantan tagon post lia foriro mi informiĝis de la ĉefingeniero ke li esta internacie fame konata specialisto pri elektrometro. Dudek jarojn antaŭe, tiu ĉi titolita specialisto foje venis al nordorienta Ĉinio kiel membro de iu vizitantaro, li ankoraŭ nebule memoras, ke sur la stratoj troviĝis krom soldatoj en grizverdaj uniformoj, komercistoj en elegantaj eŭropaj vestoj, nur malgrasaj kaj malpuraj mizeruloj en ĉifonoj. “Ne civilizita”, “mal-sanuloj de la Malproksima Oriento”, “ĉio dependas de la fremdlandoj”, tiaj ŝajnis la tiamaj neŝanĝeblajoj; estas komprenebla ke li havis dubojn ĉifoje vidinte novan Ĉinion.

Je la fino de sia letero la specialisto de elektrometro skribis:

“Tio kion Prezidanto Maŭ Ze-dung diris, estas fakto ke vi ĉinoj vere stariĝis.”

V. Rogov:

V. EROŜENKO

— Amiko de Lusin

El fremdaj esperantistoj kiu donis plej grandan influon al la Esperanto-movado en Ĉinio, estas V. Eroŝenko, rusa blinda poeto, kiu estas tre fama ankaŭ en Japanio. Li instruis Esp-on en la Pekina Universitato kaj postlasis al ni kelkajn belajn literaturajojn. Sed tre malmulton oni aŭdis pri li post lia reveno al sia patrio en 1923, ĝis antaŭ nelonge ni legis el la gazeto "Amikeco Sovetia-Ĉinia" n-ro 26, 1958, la artikolon de V. Rogov, kiun ni densige esperantigis sube.

— La Red.

EN "Voko" — novel-kolekto de Lusin, estas novelo en tri paĝoj titolita "Komedio de Anasoj", en kiu la aŭtoro skribis: "Ne longe post sia alveno al Pekino kun gitaro la rusa blinda poeto Eroŝenko ekplendis al mi:

'Solece, solece, tiel solece kiel en dezerto!'


Tio devas esti vera, sed mi ne sentis la samon; jam longe mi loĝis ĉi tie!"

La novelo plue priskribis, kiel la poeto aĉetis dek kelkajn ranidojn kaj bredis ilin en malgranda baseno. Kaj poste li aĉetis ankaŭ kvar anasidojn, kiuj formangis ĉiujn ranidojn. El la tuta simbola esenco de la priĉizo de la vivo de bestetoj, atentinda estas la simpla priskribo pri la blinda poeto mem: "Li ĉiam insistas pri la ideo — vivi el propra laboro, kaj ofte diras, ke virinoj povas entrepreni bestbredadon kaj viroj devas kulturi la kampojn."

En la fino de la novelo Lusin skribis: "Kiam la anasidoj demetis la flavan lanugon, subite eksopiris Eroŝenko al sia 'Rusiopatrino' kaj urĝe vojaĝis al Ĉita. . . ."

La novelo finiĝas per: "Nun la tempo ŝanĝiĝas jam de somerfino al vintro-komenco, sed venis nenia novaĵo pri Eroŝenko informanta, kie ja li nun troviĝas, nur la kvar anasoj, ankoraŭ kvak-kvakas sur la dezerto."

La novelo estis verkita en la jaro 1922, kvar monatojn post kiam Eroŝenko forlasis Pekinon, kaj publikita en decembro de la sama jaro en n-ro 12, vol. 8 de la "Virina Gazeto". Eroŝenko forlasis Pekinon je la 3-a de julio, 1922 por ĉeesti la 14-an Universalan Kongreson de esperantistoj en Helsinki tra Ĉita kaj Moskvo. La 4-an de novembro en la sama jaro li revenis al Pekino, kiun li definitive forlasis je la 16-a de aprilo, 1923, por reveni al sia patrio.



V. Eroŝenko

Olepentris Culuta Golou

La plej granda eldonejo en malnova Ĉinio, la Komerca Presejo en Ŝanhajo, eldonis en januaro 1922 la libron "Fabeloj de Eroŝenko", kiu konsistas el 12 fabeloj tradukitaj de Lusin el japana lingvo. Samjare la Presejo eldonis ankaŭ lian dramon "Nubo de Persikflora Koloro", kiun Lusin ĉinigis



en kunlaboro de la aŭtoro majstranta japanan lingvon, sed nenion scianta pri la ĉina. Lia kolekto de noveloj "Rakontoj de Velkintaj Folioj" tradukita de Hujucz kaj Xia Mianzun el Esperanto estis enmetita en la Biblioteko Orienta de la sama eldonejo. De post tiu tempo liaj verkoj estis plurfoje eldonitaj en ĉina traduko.

Eroŝenko estis amiko de Lusin kaj de februaro, 1922 ĝis aprilo, 1923 li loĝis kaj laboris kune kun la lasta en Pekino. Sed el la Plena Verkaro de Lusin eldonita de la Popola Literatura Eldonejo 1956, oni povis legi nur simplan noton pri li:

"La blinda poeto Eroŝenko estas ruso, kiu verkis plurajn fabelojn en Esperanto kaj japana lingvo. En la jaro 1921 li venis de Japanio en Ĉinion kaj instruis Esperanton en la Pekina Universitato. "Nuboj de Persikflora Koloro" k. a. el liaj verkoj estis tradukitaj de Lusin en ĉinan lingvon."

Kia homo estis Eroŝenko? Kian sorton li poste havis? Pri tio mi komencis enketi de la jaro 1938. Sed mi ne trovis pli detalajn materialojn ĉe koncernaj institucioj en Moskvo, Ĉita, Leningrado, Pekino kaj Ŝanhajo.

En la printempo de 1957 mi renkontis en Japanio intimajn amikojn de Eroŝenko, maljuna verkisto Akita Uĉjaku kaj la ĵurnalisto Kamioka Seiĉi, vizitis ankaŭ la parencojn de la studanto de rusa literaturo, verkistino Soma Kuromizu (1877-1955). Ĉe ili mi informiĝis pri la vivo kaj agado literatura kaj socia de la rusa poeto en Japanio.

Akita vidis Eroŝenkon lastfoje la 7-an de novembro, 1927 sur la Ruĝa Placo en Moskvo. Tiam Eroŝenko laboris kiel tradukisto en la Komunisma Universitato de Orientaj Laboruloj. La maljuna verkisto, kiu estas unu el la iniciatin-toj de la japana socialisma junular-movado rakontis:

"Eroŝenko ne estis marksisto, sed li simpatiis kun orientaj revoluciistoj kaj la unuaj japanaj socialistoj. . . Sendube, li estis progresema homo kaj revoluciulo en la karaktero. Li ludis gravan rolon en propagando pri la grandioza rusa revolucio kaj enkonduko de antaŭrevolucia rusa literaturo kun demokratia tendenco."

"Atentinda estas tio," diris Akita, "ke Eroŝenko estis treege sentema kaj kun temperamento ekscitiĝema. Cetere li estis tre sincera kaj fidela al siaj kredo kaj amikoj. Kiam la granda Oktobra Revolucio havis rektan influon en Japanio, Eroŝenko

estis tre bonvenigata persono en Tokio. Tre alte taksis lin Katajama Sen, kiu trovis en li specialiston majstrantan japanan lingvon kun kapablo tre precize japanigi rusan originalon. Eroŝenko aktive partoprenis la laboron de la literatura societo "Kulturanto", kiu unuigis siatempe japanajn socialismajn junulojn. Pro sia aktivado en socialisma movado japana registaro prenis lin "malbonulo", kaj forpelis lin el Japanio al Vladivostok, tiam okupata de blankaj banditoj kaj imperiistoj. Sed, oni ne scias, kiel li sukcesis atingi Ŝanhajon, kaj poste iris al Pekino."

En Japanio, eldoniĝis tri volumoj de "Verkoj de V. Eroŝenko" en japana lingvo.

1. "Kantoj antaŭ la Mateniĝo", 1921, kom. de Akita;
2. "La Lasta Spiro", 1922, kom. de Akita;
3. "Por la Homaro", 1924, kom. de Kamioka Seiĉi.

Tiuj verkoj preskaŭ tute pereis en la tempo, kiam la japanaj militaristoj entreprenis ekstermadon de "danĝeraj pensoj".

Antaŭ ne longe eldoniĝis en Japanio lia ampleksa biografio: "La Blinda Poeto V. Eroŝenko" verkita de esp-isto Takasuki Iĉiro, literatura profesoro de Ŝizuoka Universitato, en 1956. Japanaj amikoj rimarkigis al mi ke en ĝi troviĝas sufiĉe multe da materialoj ne ĝustaj, mi opinias, ke ĝiaj ĉefaj materialoj estas tamen findindaj.

Laŭ tiu libro Vasilij Eroŝenko, alvenis al Tokio, Japanio la 27-an de aprilo 1914, tri monatojn antaŭ la unua mondmilito. Li venis tien komisiite de la Societo de Rusaj Esperantistoj viziti S-ron Nakamura Seio, profesoro de Tokia Universitato. Kelkajn monatojn poste, li konatiĝis kun Akita Uĉjaku, Kanda Hotaro kaj aliaj aktivuloj de socialisma junulara movado en Japanio. En 1915 li konatiĝis kun studento de rusa literaturo prof. Katakami Ŝin, verkistino Soma Kuromizu kaj socia aganto Mijazaki Toranosuke. En januaro, 1916, li aperigis sian unuan literaturan verkon en Japanio "Rakonto de Lampo", en la gazeto "La Espero". En 1917 li vojaĝis al Birmo kaj laboris tie kiel instruisto en blindula lernejo. En 1918 li transiris al Hindio kaj estis elpelita de la Britia koloniista aŭtoritato en 1919. La 3-an de julio en tiu jaro li revenis al Japanio kaj aktive partoprenis japanan socialisman movadon. Li estis arestita en 1921 dum Maj-unua demonstracio. Kaj refoje arestita en la sama monato pro partopreno al la 2-a Kongreso de la Japana Socialista Ligo. La 28-an de majo la japana registaro dekretis forpelon de Eroŝenko el la lando. La 6-an de julio, 1921 li atingis Vladivostok-on, tiam sub okupado de japanaj trupoj. Li malsukcesis reveni al Moskvo tra Nordorienta Ĉinio. Invitite de ĉina esp-ista

organizaĵo sub gvido de Hujucz li iris al Ŝanhajo por gvidi Esp-ajn kursojn. En februaro 1922 li transiris al Pekino, instruis Esp-on en Pekina Universitato kaj konatiĝis kun Lusin. La 16-an de aprilo, 1923, kiam starigis diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Sovetio, li revenis al Moskvo.

Troviĝas en la Biografio kronologia listo titolita "Notoj pri la Vivo kaj Agado de la Blinda Poeto V. Eroŝenko", el kiu ni legas: "Vasilij Eroŝenko naskiĝis 1890 en familio de etbienulo en vilaĝo Gorodiŝče, Kurska gubernio. Li havis du pliaĝajn fratinojn kaj unu plijunan fraton."

La fina parto de la kroniko tekstas jene:

1924-1927—Faris tradukajn laborojn en la Komunisma Universitato de Orientaj Laboruloj, Moskvo.

1928-1929—Mankas informo.

1930—Laboris en la Fako por Eksterlandaj Interrilatoj de la Tutrusia Blindula Ligo.

1931—Mankas informo.

1932—Partoprenis en la 24-a Universala Kongreso de Esp-o, Parizo.

1933-1939—Mankas informo.

La kroniko interrompiĝas ĉi tie. Evidente la aŭtoro bazigis sian verkon pri la vivo de Eroŝenko post lia reveno al Moskvo, nur laŭ hazarde ricevitaĵ materialoj ne konfirmitaj.

Mi ne povis informiĝi el la arkivoj de la nomita Komunisma Universitato kaj RLE ĉar ili jam ne plu ekzistas; en la Tutsovetia Blindula Ligo iuj sciis lin, sed ne povis doni informojn pri lia posta vivo. Finfine, kun helpoj de ĵurnalisto kaj sinologo Lihterov kaj esp-isto prof. Bokarev (de Lingvistika Instituto de Sovetia Akademio), mi sukcesis trovi amikon de Eroŝenko, blinda verkisto kaj redaktoro de "Sovetia Studento" (gazeto por blinduloj), Ŝojev, kiu loĝis kune kun Eroŝenko en Moskvo por 12 jaroj (1926-1938). Li konfirmis ke la plena nomo de lia amiko estas Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko.

Li naskiĝis en vilaĝo Obuĥovka, distrikteto Zmievskij, Kurska distrikto, blindiĝis pro morbito estante kvarjaraĝa, finis la lernadon en la Unua Blindula Lernejo de Moskvo en la jaro 1908. En 1908 aŭ 1909 li iris lerni en Londona Reĝa Kolegio kaj Blindula Muzika Kolegio. Li lernis ludi violonon, sed tio ne prosperis al li. Li vizitis Kropotkin-on ĉe Harrow proksime al Londono 1913. En la sama jaro li estis ial eksigita el la lernejo kaj revenis Rusion.


Post reveno de Japanio kaj Ĉinio li laboris ses jarojn en la Komunisma Universitato de Orientaj Laboruloj kaj tradukis multajn socialpolitikajn

librojn el la rusa lingvo en la japanan. En 1935 li vizitis sian fraton en Ĉukotka-duoninsulo. Rezulte de tiu longa vojaĝo li verkis "Ĉukotkaj Fabloj", kiu aperis samjare en la gazeto "Blindula Vivo". Dum la Granda Patriota Milito li estis transloĝigita en Turkmenio kaj loĝis en malnova citadelo de Kuŝka. Tie li instruis la anglan lingvon en lernejo kaj studis puŝtu-an lingvon. Reveninte Moskvon 1945, li instruis la saman lingvon en Blindula Lernejo de Novo-Aleksejevskaja strato kaj ofte malsanis. En 1949 li revenis al sia hejmvilaĝo.

Laŭ la enketo de la vilaĝa soveto de Obuĥovka datita la 13-an de februaro, 1958: "Civitano Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko, naskiĝis la 31-an de decembro 1889. Naskiĝloko: vilaĝo Obuĥovka, distrikteto Staro-oskolskij, distrikto Belgorodskaja. Mortis la 23-an de decembro 1952. Enterigita en la publika tombejo de Obuĥovka." Tiel finiĝis la diligenta nelacigebla vivo de la amiko de la eminenta ĉina granda verkisto Lusin.

Sichuan-Guizhou-a Fervojo en Konstruado

Lignogravuraĵo de Jia Yi-xiang



Patrino Needziniginta

EA koro, de ĉiu virino kiu baldaŭ fariĝos patrino ĝenerale plenas de feliĉa sento miksitaj kun iom da maltrankvilo. Kiam ŝi eksentas, ke moviĝetas malgranda vivo en ŝia sino, fontas el ŝia koro sento nepriskribebla, estiganta al ŝi jen rideton, jen kelkajn larmojn. Kaj ŝi ĉiam deziras ĉion komuniki al aliaj, peti iliajn konsilojn kaj ilin pridemandi; sed ŝia gorĝo restas kvazaŭ ŝlosita, kaj nenion ŝi povas eldiri. Ĝuste sub la regado de tia sento, Tang Qi, kiu edziniĝis nur antaŭ unu jaro, atendis la alvenon de la unua infaneto.

Estis ordinara libertago. Varmaj sunradioj enfluas en la ĉambron tra la fenestrokradoj. Eliris la edzo, do al kiu ŝi verŝu sian plenan koron da vortoj! Al kiu ŝi konfidu siajn ĝojon, maltrankvilon, feliĉon kaj dubojn!

Subite ekfulmis en ŝia kapo la figuro de Bofranjo Yang Xiu, afabla virino de ĉ. 40-jara aĝo, kies malkaŝema kaj honesta karaktero forte impresis ŝin jam delonge. Sur ŝia negrasa vizaĝo, montriĝis kelkaj sulketoj apenaŭ videblaj, kvazaŭ signoj memorigantaj pri gloro kaj batalo kaj spuro postlasita de la malfacilega tempo pasigita. Kiel afabla kaj bonkora vizaĝo ĝi estas! Jes, iru paroli kun ŝi.

Kaj Tang Qi stariĝis, eliris per malrapidaj kaj ŝanceliĝantaj paŝoj al la najbara domo de Yang Xiu. Puŝmalferminte la pordon ŝi vidis, ke Yang Xiu sidante sola faras ŝuplondon.

“Prezidanto Yang!”

“Ah! estas vi! Kial denove prezidanto, ĉu mi ne jam diris al vi, ke vi nomu min Bofranjo Yang Xiu!” milde kaj amike ŝin riproĉis Yang Xiu. “Nu, sidigu.”

“Por kio vi venas?” demandis Yang Xiu rigardante al Tang Qi kaj samtempe flanken metis la ŝuplondon.

“Por nenio. Mi sentis solecon kaj venas al vi por min distri!” Tang Qi diris konfuzite. “Bofranjo Yang Xiu. . . ĉu vi havas infanojn? . . .”

“Jes, mi havas! Kial vi faris tian stultan demandon? Mi ja havas du infanojn!”

“Ĉu vi bonvolus preparoli al mi? Kiam vi naskis la unuan infanon. . .”

Ektremis al Yang Xiu la vizaĝo kaj ŝi silentiĝis. Tang Qi ŝin fiksigardis, kaj vidis ŝin ekkuntiri siajn brovojn kvazaŭ ion pripensante aŭ rememorante.

Poste, Yang Xiu murmuris: “Kion mi diru al vi? Ĉu miaj travivaĵoj povus vin helpi? Mi amas infanojn, kaj mi faris ĉion kion patrino povas, sed mi estas patrino needziniĝinta, kaj mi ne travivis, kion la patrino devas travivi.”

Du Poemoj

Loŭŝanguan*

*Furiozas okcidenta vento.
Sub la lun' de prujnmaten', ostardoj krias en
la vasta firmamento.
Sub la lun' de prujnmaten'
Resonadas la hufbatoj klakaj
Kaj trumpetaj blekoj jen kaj jen.*

*Ne kalkulu la pasejon kiel ferbarajon,
Ni trapasos tuj kun granda paŝo.
Ni trapasos tuj,
Jen grizbluaj montoj ŝajnas ondiĝanta mar'
Kaj ruĝegas sange la subiranta sun'.*

Liŭpanŝan**

Sur alta firmamento kun lanugaj nuboj,

Kaj sekve de tio komenciĝis egaltona kaj malrapida rakontado kvazaŭ murmuranta flueto en printempa montvalo. . .

Tiam ankoraŭ daŭris la Kontraŭjapana Milito, kaj nia vilaĝo estis unu el la kontraŭjapanaj bazoj. Ĉe la vilaĝfino loĝis junulo nomata Huang Mian-shi, kies edzino mortis de japana bombado tri jarojn post ilia geedziĝo kaj postlasis al li du infanojn, la pliaĝa iom pli ol dujara kaj la plijuna nur kelkmonata. Li havis ankaŭ avon kaj ili kvar vivis kune.

Tiam mi estis nur 18-jara, kaj respondecis pri la virinaj aferoj. Tuttage mi kuradis eksterhejme, kaj havis multajn ŝancojn interrilatiĝi kaj interparoli kun aliaj. Mi konfesu al vi, ke mi ja estis knabino, kaj eĉ kun mia ŝtona kapo ja povis ekrimarki, ke kelkaj junuloj min kaŝe amas. Mi memoras, ke foje iu junulo nemalbona diris al mi:

Ĉiutage vi kuradas ekstere, ĉu vi ne lacas?"

"Ne!" mi respondis.

"Ĉu vi konas min. . . kaj scias mian penson?"

"Kial mi ne konas vin. Tamen, koncerne al la penso, mi scias nur tiun de virinoj." Verdire,

dank' al nia virina sentemo, mi jam tuj rimarkis, kion sub-aludas liaj vortoj, sed mi respondis ŝajnigante nenion komprenanta.

"Ĉu vi ne pensis pri. . .ge. . ." li balbutis kaj ruĝiĝis.

Mi ektimis. Kiel hontige estus, se li eldirus ĉion! Tial mi tuj interrompis lin: "Ah, vi volas paroli pri gefratoj suferantaj en la okupataj regionoj? . . ." Vidante ke mi parolas tiamaniere, li tuj kapjesis dirante: "Jes, jes." kaj foriris.

Post lia foriro, mi longe ridadis. Efektive, tiam mi ne volis paroli pri tio, ĉar tiam estis la plej malfacila tempo de Kontraŭjapana Milito. Kiu do havus liberan spacon en la koro por tia afero? Krome mi estis tiam ankoraŭ tre juna.

Sed foje mi iris pro ia afero al la hejmo de Mian-shi, Mi ekhaltis ĉe la pordo, ĉar mi aŭdis, ke Mian-shi interparolas kun sia avo:

"Reedziĝu, Mian-shi! Vidu, sen mastrino en la domo, ĉu la hejmo ankoraŭ aspektas hejmo?" Oni povas distingi, ke tio estas la voĉo de la avo.

"Ĉu povas esti tiel facile! Ĉu tio estas grato al jukanta haŭto, kion oni povas fari laŭvole? Kaj

de Mai Ze-dung

Ostardojn vojaĝantajn suden sekvas ni per
rigard' en van'.
Ho, kiuj haltus ne vidinte Grandan Muron ne
estas herooj,
Dudek mil loĝojn ni tramarŝis jam.

Sur la altega pinto de Liŭpanŝan,
En okcidenta vento lude flirtas ruĝa flago.
Nun longan zonon firme tenas ni en mano,
Kiam do estu katenita tiu monstra drako†!

Elĉinigis S. J. Zee

*Louŝangan — fortikaĵo super grava pasejo sur Louŝan-monto norde de Zunyi-gubernio, Guizhou-provinco. Ĝi gardas la vojon de Guizhou-provinco al Sichuan-provinco. En januaro de 1953 la Ruĝa Armeo


de Laboristoj kaj Kamparanoj konkeris la urbon Zunyi sub la komando de Prezidanto Maŭ kaj baldaŭ poste trapasis la pasejon.

**Liŭpanŝan estas monto kun tre krutaj kaj zigzagaj vojoj en la sudokcidento de Guyuan-gubernio, Gansu-provinco. En septembro de la jaro 1953 la Ruĝa Armeo de Laboristoj kaj Kamparanoj transiris ĝin venkinte la Kuomintangan garnizonon sub la gvido de Prezidanto Maŭ.

†Monstra drako — la aŭtoro aludas per ĝi la japanan imperiiston.

Pasejo sur Louŝan-monto

Foto de Qi Guan-shan



cetere, kiu knabino volus veni en domon kia la nia?"

"Tre kapabla estas la knabino de Yang-familio. . ."

Mi scias, ke li parolas pri mi, do mi atente aŭskultis kun retenata spiro.

"Vi nur songas! Vi ja perdis la saĝon pro maljuniĝo."

Mi ne plu aŭskultadis kaj forkuris.

Kial ili parolas pri mi? Mi ekcerbumis. Tio eĉ neniam venis en mian kapon! Jes, li estas tre honesta, sincera, kaj cetere tiel laborema, ke li kvazaŭ sentas malkomforton se liaj manoj ĉesas ion fari. Precipe dum la lastaj tagoj, li silente penlaboras. Oni povas rimarki signojn de ĉagreno kaj kolero nur el liaj okuloj kaj ĉe la kunpremitaj lipoj. Ĉu mi lin amas? Ne, tio neniam venis en mian kapon, ĉar mi apenaŭ ĉesis esti infaneca! Kaj krome, li havas du infanojn, estas neeble. . . Sed li ja vere bezonas edzinon! Eble mi kompatas lin? Sed amo ja ne estas almozaĵo. . . .

Kelkaj Novaj Popolkantoj

I

*Tiuj du korboj sur la vekto estas ne tre grandaj,
Kiu portadas teron dum fosad' aŭ dig-riparo.
Ne malestimu ja ilian tre modestan grandon,
En ili povas esti forportata eĉ montaro.*

II

*La vekt' ne estas longa, nur pli ol tri futojn,
La korboj ne tre grandaj estas el saliko,
Ne malestimu tiujn ne imponajn ilojn,
Hieraŭ ni forportis du montojn, amiko!*

III

*Kio ja estas la plej granda? La ĉielo.
Superas la ĉielon nia energio.
Kaj dioj estas certe la plej plej potencaj,
Sed nia saĝ' ne malsuperas al la dio.
Herooj de la pasinteco jam forpasis.
Rigardu la heroojn veraĵn de hodiaŭ!*

Elĉinigis S. J. Zee

Ekde tiam, li invadis en mian animon, kvankam kun la paso de tempo mia penso pli kaj pli forlasis lin, kaj fine rekvietiĝis mia koro, ĝuste kiel rekvietiĝas post ondado la akvo de lago, en kiun oni jetis ŝtoneton.

Tiel multkolora kaj komplika estas la vivo, ke oni ne povas restadi kvieta. . . .

Alvenis alvoko de la supera instanco por armeaniĝo. Denove estis laboro por la virina asocio: la edzinoj persvadis la edzojn, fratinoj la fratojn, patrinoj la filojn, ĉie estis agitado entuziasme. Por mobilizo, ni vizitis familion post familio, kaj interparolis kun ĉiuj junaj kaj fortaj viroj escepte de Mian-shi. Ne pensu, ke tio estis pro la menciita okazintaĵo; ne, sed ĉar ni pensis, kvankam li estas homo ĉirkaŭ 20-jara, tamen ne havante edzinon li havas sub sia zorgo du infanojn kaj maljunan avon, kaj krome ja ne granda estis la nombro de homoj bezonataj, tial ni ne volis mobilizi lin.

Post mobilizo, oni decidis kunvoki amasan kunvenon por publika registrado de sinanoncantoj.

Festa atmosfero regis en tiu tago: ĉie estis afiŝoj kun sloganoj, bruis tam-tamado kaj tamburado; la junuloj kantis kantojn de la armeo kaj la knabinoj mallaŭte zumis la melodion de "La Amato al la Ruĝa Armeo".

Tuj post la anonco, ke komenciĝas la sinregistrado, Mian-shi la unua suriris la podion, tute ekster mia atendo. Lia neparolema buŝo ektremis kelkfoje, kaj diris kun ekscitiĝo: "Mi petas min registri!" kaj li reiris malsupren.

Ekregis silento, kaj poste diris la vilaĝestro: "Ĉu vi bone pripensis, Mian-shi, ke via edzino mortis. . . kaj du infanoj bezonas. . ."

Kvazaŭ pikite de io, Mian-shi neatendis ĝis la finiĝo de lia parolo, subite stariĝis kaj diris urĝeme: "Mi aliĝas al la armeo ĝuste pro la morto de mia edzino. Mi iros al la japanaj diabloj por fari kun ili kalkulon. Kvankam mi silentis, sed en mia koro kvazaŭ brulas. Se ni ne ekstermus la malamikojn, malfeliĉo trafus ankoraŭ alies karulojn kaj ankaŭ miaj du infanoj ne povus esti sekuraj. Registru min, mi petas. Eĉ se vi ne donus al mi pafilon, per la manoj mi povus prem-sufoki malamikojn." Pro ekscitiĝo kaj urĝeco, lia voĉo sonis kun speciala sonoro, kvazaŭ kluzpordo longe fermita

subite malfermiĝis, kaj la riverakvo eltorentis tra la mallargha pasejo.

Kaj mi vidis, ke la mano de la registranto tremmoviĝis kelkfoje kaj malrapide enskribis la nomon de Huang Mian-shi en la registran libron. Poste mi falis en profundan meditadon. Multegon mi pensadis, ke mi eĉ ne rimarkis, kiuj sinanoncis poste. La vortoj de Mian-shi ĉiam cirkuladis en mia koro. Jes ja, ni povas eĉ premsufoki mal-amikojn per la manoj! Ĉu ili aliĝas al la armeo ne ĝuste por venĝi milojn kaj milojn da viktimoj kia la edzino de Mian-shi, kaj por protekti milojn kaj milojn da infanoj kiaj tiuj de Mian-shi? Kiel nobla estas lia penso. Mi ja ne atendis, ke la neparolema Mian-shi povas eldiri tiel bonajn vortojn. Mi rimarkis nur nun, ke ankoraŭ io pli bela troviĝas en la koro de Mian-shi krom honesteco kaj sincereco. En mia kapo eknestis penso malklara, kiu jen instigis min iri al li por diri kelkajn kuraĝigajn vortojn, jen sigelis mian buŝon kvazaŭ plastro. Kaj antaŭ ol mi fine sukcesis interparoli kun li, li jam formarsiis.

Laboro ja estas la plej efika medikamento por kuraci maltrankvilon de la koro; nur se vi plenforte laboras, vi malofte povas pensi pri aliaj aferoj. Sed post laboro, kiam oni kuŝas nokte sur la lito, diversaj pensoj denove sin fiksis al la cerbo kvazaŭ lapsemoj. Kaj mi denove ekpensis pri li. . . .

Fine mi faris viziton al la hejmo de Mian-shi, parte pro mia ofico, parte pro mia korinklino. Ĉe la pordo, mi aŭdis ploradon de infano, tiel laŭtan kaj ĉagrenan. Mi aŭskultis atente kaj ekaŭdis ankaŭ la kadukan voĉon de la avo de Mian-shi kiu klopodis kvietigi la infanon, sed lia voĉo estis tiel malforta kompare kun la ploro de la infano, ke ĝi droniĝis en la plorado.

Mi puŝmalfermis la pordon kaj eniris. Kiam la avo de Mian-shi min vidis, lia vizaĝo tuj pleniĝis de ĝojo, kaj li diris kun bedaŭro: "Vi venas, sidiĝu. Malpurega estas nia domo, pardonu!" Mi stultiĝis, ne sciante kial. Ĉiuj diris, ke mi estas knabino sufiĉe sagaca, sed nun, mi ne scias kien forflugis mia sagaco! Mi nur murmuris: "Kio ja okazis al la infano?"

"Mi konfesu al vi, post la morto de ĝia patrino, mankas al ĝi konvena prizorgo, kaj anstataŭ lakton, ĝi manĝas ĉiutage nur kaĉon. Jen vidu, ĝi havas jam nur ostojn sub la haŭto."

Kaj mi haste transprenis de liaj manoj la infanon, ĝin tenante kaj balancante en la sino ekkantis lulkanton kiel patrino kvankam ne sen ĝeno. Tre strange, ĝi ĉesis plori en miaj brakoj. Ĝin tenante brakume, mi paŝadis tien kaj reen, kaj aŭdis, ke la avo de Mian-shi ankoraŭ mur-



Ilustris Wang Shu-hui

muradis: "Kiel mizera estas la domo kie ne estas virino! Neniu ordigas la ĉambron, kaj neniu lavas la vestojn. Mi konsilis al Mian-shi, ke li reedziĝu, sed. . ." Li finis sian plendon per suspiro. Mi timis, ke li ĉion eldiros. Mia koro saltis maltrankvile, kvazaŭ mi estus farinta maldecaĵon. Arda flamo brulis de mia koro ĝis la vangoj, kaj de la vangoj ĝis la oretradikoj. Finfine la infano endormiĝis. Mi metis lin sur la liton, kaj ĝin kovris per peco da ĉifona kotonvataĵo. La pordo malfermiĝis, kaj envenis la dujara infano de Mian-shi per malfirmaj paŝoj. Apenaŭ post kelkaj paŝoj, li falis teren. Sed li ne ploris; li tuj leviĝis, forviŝis la polvon de sur la vizaĝo, kaj restis silenta. Eble li jam kutimiĝis al falado. Mi eksentis acidon en la nazo, kaj ekstremis la koro. Ho, sen prizorgado de patrino, ŝanĝiĝis ankaŭ la infano! Ĉu li ne estas ĝuste en la aĝo por ĝui la kareson de patrino amo? Mi rapide deturnis la vizaĝon, por forviŝi la larmojn kaj rerigardante al la infano mi jam povis flari ian malagrablan odoron kelkajn paŝojn malproksime—malpurega li estis. Mi tuj petis la avon de Mian-shi varmigi akvon kaj mi banis lin kaj ŝanĝis por li la vestojn.

Mi hejmeniris nur je noktiĝo. Mia koro ne povis kvietigi dumlonge, kaj Mian-shi kaj liaj infanoj sintrudadis en mian kapon. Mi ege ekscitiĝis, ĉar mi gustumis la senton de patrino. Mi ŝatis infanojn kaj ankaŭ ilian patron, sed samtempe mi ektimis, ĉio ĉi tio estis ja tiel nekomprenebla!

Nur tiam mi ekpensis pri amo, kiu iom post iom enpenetris en mian koron. Ĝi envenis tiel neatendite sed malrapide, tiel milde sed nerezisteble. Jes, la infanoj devas havi patrinon, kaj Mian-shi devas havi edzinon, kaj laŭ la diro de la avo de Mian-shi, en ilia hejmo devas esti virino. Nun

li faras vivmortan batalon kontraŭ la malamikoj defedendante la tutan nacion per sia vivo. Do li des pli rajtas tion postuli de la vivo, sed kial li malkuraĝis tion diri!

Depost tiu tago, mi iradis al la domo de Mian-shi preskaŭ ĉiutage por ordigi la domon, lavi kaj fliki vestojn kaj prizorgi la infanojn. Iom post iom mi al kutimiĝis al tiuj laboroj, kaj ili fariĝis kvazaŭ parto de mia vivo. Iam mi eksentis panikon je la iom-post-ioma enpenetro de tio en mian vivon, sed tiun panikon ĉiam venkis la ĝojekscitiĝo.

Iun posttagmezon, mi denove iris en la hejmon de Mian-shi. La plijuna infano jam endormiĝis. Min vidinte, la du-jara infano alkuris al mi, ĉirkaŭprenis mian kruron kaj neatendite min nomis per sia infaneca buŝeto "Panjo". "He he he!" ekridis la avo de Mian-shi. Granda kvanto da sango tuj fluis en mian vizaĝon, estis tre seke en la buŝo, mi ne povis elbuŝigi eĉ unu vorton, sed nur ridis, ĉu pro ĝojo ĉu pro honto, mi mem ne sciis. Haste mi min turnis, intencis elkuri, sed mi tuj haltis, ĉar mi ekkonsciis, kian vundon tio farus al la animo de la infano, se mi forkurus de li. Ĉu tiu voko ne estis fakte atendata de mi tage kaj nokte? Sed kial ĝi venis tiel rapide kaj subite! Do mi haste levis la infanon kaj kisis lian vangon

Patrino kaj Filo

Skulptis Zhang De-hua



per miaj ardaĵoj lipoj dirante mekanike: "Karuleto. . . ."

Mi portis lin surbrake en la ĉambron, sidiĝis sur la litrandoj, jen gapis al la plafono, jen fiksrigardadis la amindajn vangojn de la infano. Li sin alpremis komforte al mia sino kun tia konfido al mi, ia forta amsento rapide kreskis en ambaŭ koroj kaj kvazaŭ interfluadis tra la pluraj tavoloj da vestoj. . . .

Eĉ mi mem ne scias kial mi ekskribis leteron al Mian-shi. Tiel fortege saltadis mia koro, ke mi povis ĝin senti eĉ ĉe la temploj, kaj mi skribis per zigzagaj strekoj:

Mian-shi: Vian interparolon kun via avo mi iam aŭdis.

Se ne malplaĉus al vi, mi transloĝiĝus en vian hejmon por prizorgi viajn infanojn. Estu sindona en la bataloj kaj ne ĝenu vin pri la hejmo. Kiom ajn longe vi forestos, mi certe atendados vian revenon. Respondu al mi!

Yang Xiu

Du monatoj forpasis, sed ankoraŭ ne venis lia respondo. Mi ekmaltrankviliĝis, kaj diversaj konjektoj eksvarmis en mian kapon: Eble li ne konsentas? eble li jam. . . . Ĉial ajn li devas respondi al mi!

Ĉiutage mi iradis al la hejmo de Mian-shi kiel antaŭe. . . .

Forpasis tri monatoj, kaj finfine venis respondo. Ĝi estis respondo perbuŝa, kiun transdiris al mi iu hejmen-reveninto de la armeo. Li diris: "Kelkajn minutojn antaŭ la formariĝo al batalo li legis vian leteron kaj larmis pro ĝojo. Li ne kuraĝis ekkredi, ke tio estas vero. Li diris, ke vi estas bonkorega al li, kaj li skribos al vi tuj post la batalo."

Kvankam tio estis nur malmultaj vortoj, sed ili ja estis vortoj longe atendataj de mi! Kvietiĝis mia koro, kaj mi transloĝiĝis en lian domon kun decidemo por prizorgi la du infanojn kaj atendi lian revenon.

Denove komenciĝis la "balaado" al la kontraŭjapana bazregiono fare de la japanaj diabloj, kaj nia vilaĝo estis sub minaco de tuja okupiĝo. La supera instanco ordonis, ke ni retiriĝu, do mi forlasis la vilaĝon kun la du infanoj kaj la avo, kaj iris al alia vilaĝo.

Rompiĝis la interrilatiĝo inter mi kaj Mian-shi malgraŭ miaj klopodoj por informiĝi pri li.

Forpasis jam kvin jaroj, kiam mi fine akiris informon pri li; sed la informo alportis al mi kortranĉan doloron: Mian-shi oferis sian vivon kelkajn tagojn post la ricevo de mia letero. Ĉar mi translokiĝis, la maljuna vilaĝestro povis transdoni al mi la informon nur post kvin jaroj je nia hazarda renkontiĝo. Kaj li donis al mi ankaŭ leteron terure ĉifitan kun vortoj jam malklaraj. Ĝi estis letero skribita de Mian-shi kelkajn minutojn antaŭ sturmado: "Yang Xiu, tre bonkora, bonkorega vi estas! Mi povas vin danki nur per ekstermo de pli da japanaj diabloj!..." Mi ankoraŭ ne finlegis kiam larmoj jam plenigis la okulojn. Longe mi sidis stulte kaj en la koro sentis malplenon, kvazaŭ io estus fortranĉita de ĝia interno. Ho ve, vaniĝis do mia amo, miaj esperoj, mia atendado?

Estis la maljuna vilaĝestro, kiu redonis al mi la saĝon, li diris: "Viajn ĉagrenon kaj doloron mi komprenas. Vi estas bona kamaradino. Sed kion fari? Ja estas milito! Estu kuraĝa kaj bone prizorgu la du infanojn, ĉar ili ja estas posteuloj de revoluciistoj!"

De tiam mi faris laŭ la konsilo de la maljuna vilaĝestro. Mi baraktadis kontraŭ ĉiuj malfaciloj por varti la infanojn. Mi travivis multajn maldolĉaĵojn kaj malfacilojn, kaj nun finfine ili jam plenkreskis.

Mi povis diri, ĉion kion patrino povas doni, mi al ili donis, ĉion kion patrino povas fari, mi jam faris. . . .

"Panjo . . ." voĉo venis de ekster la pordo, kaj tiu voĉo ekvekis Tang Qi kaj Yang Xiu de la murmura rakontado.

"Ah! Jun-zhi revenas." Ĝoje rimarkis Yang Xiu.

Momenton poste, ŝia filo Jun-zhi aperis antaŭ ili Longe Tang Qi fiksrigardadis lin, kvazaŭ penante retrovi postsignojn de la falema sed ne-plorema infano, ke Jun-zhi embarasiĝis ne komprenante la kialon. Tiam Tang Qi fortunis sian rigardon kaj malrapide paŝis el la pordo. Ankaŭ Yang Xiu elvenis ŝin sekvante kaj diris kun bedaŭro: "Pardonon, ke mi perdis al vi tempon kaj vane vi min vizitis!"

"Ne," diris decide Tang Qi. Ŝi pensis: ĉu vana estas la vizito? Ja multon ŝi instruis al mi; ŝi instruis al mi, kiel plenumi la devon de patrino, kaj tio kion ŝi rakontis, estas multe pli profunda kaj vasta ol ĝeneralaj scioj.

Denove aŭdiĝas el la interno de la ĉambro la voĉo "panjo", tiel intima kaj amema.

Elĉinigi Li Shi-jun

Proverboj el Tibeto

1.

*Rezultato ellaborita diligente de bonuloj
Povas esti detruita de unu vorto de kanajlo,
Kaj grenplantoj kulturitaj tutjare de kampuloj
Povas esti difektitaj subite de densa hajlo.*

2.

*Malbonulo ofte senkulpigas sin
Dirante ke tio estas alies peko;
Korvo ofte viŝas sur la pura tero
La koton sur sia malpurigita beko.*

3.

*Malbonulo agas dece en iu temp',
Sed li estas nur hipokrita!
Kaj vi povas ŝajnigi vitron kiel gem',
Sed en akvo fine montriĝas ĝia koloro efektiva!*

4.

*Postsigno de hufo estas facile plenigebla per akvo;
Eta provizejo estas facile plenigebla per provizaĵo;
Malvasta kampo estas facile plenigebla per semoj;
Kaj malsaĝulo facile ebriiĝas de malmulta scio.*

Retradukis el ĉina lingvo Lü Mo-ye.

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj

Traduko aŭ aliaj bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur:

1) Post la utiligo rimarku el kiu numero de nia gazeto ĝi devenis.

2) Sendu al ni 4 ekzemplerojn de la materialoj sur kiu aperis la tradukoj aŭ alimaniere utiligoj.

3) Sciigu al ni kia estas la eldonaĵo sur kiu aperis via traduko aŭ aliaj utiligoj, se eble ankaŭ nombron de la legantoj.

Per tiaj kunlaboroj, vi multe helpas la pluan prosperon de nia movado en Ĉinio, sekve ankaŭ alportos plian brikon por la sukceso de Esperantomovado en la tuta mondo.

La Deveno de Konvolvulo

ĈU vi scias kiel komencis kreski la konvolvulo, kiu nomiĝas en ĉina lingvo *ĉjannju-hŭa* (t.e. bovtira floro)?

Antaŭ tre tre multaj jaroj, ĉe la bordo de la Flava Rivero estis granda monto, sur kiu kreskis pinoj, cipresoj, kaj sovaĝaj herboj kaj vivis ankaŭ diversaj birdoj sed nur ne floroj. Nenie sur la monto oni povis trovi floron kaj pro tio oni ĝin nomis Senflora Monto.

Ĉe la montpiedo loĝis malgrandaj frato kaj fratino. La frato dekses-jara nomata Malgranda Xia paŝtis bovon por bienulo, la fratino dektrijara nomata malgranda Hua, kolektis herbojn ĉiutage sur la monto. La frato sin vestis blue kaj la fratino ruĝe. Ili estis georfoj sen paĉjo kaj panjo.

Iun tagon, kiam la supro de la okcidenta monto rebrilis de la vespera ruĝo de la malaperinta suno, Malgranda Hua ankoraŭ vane atendis la revenon de la frato por vespermanĝo, kaj poste kiam la birdoj reflugis al siaj nestoj kaj la kokoj ekdormis sur siaj sid-trabetoj, tamen ne aperis ankoraŭ la frato. Tre maltrankviliĝis Malgranda Hua kaj elkuris por serĉi lin. Fine ŝi trovis, ke ŝia frato estis ligita pendante en la stalo de la bienulo, kiu kruele batis lin per vipo trempita en akvo.

Dolore ŝiriĝis la koro de Malgranda Hua. Tirante la baskon de la bienulo, ŝi lin plorpetegis: "Indulgu mian fraton, pardonu lian kulpon!"

Surde al ŝia petego kun kruelega rigardo, la bienulo blasfemis: "Vi perdis mian grandan bovon, mizera bubaĉo, mi nepre mortbatos vin!"

"Nur haltu bonvole mi retrovos por vi la bovon!" diris Malgranda Hua, kiu tuj turnis sin kaj rapidis for al la monto. La alvoko de ŝia frato ne sukcesis ŝin reteni. En unu spiro ŝi kuris al la montpiedo.

Estis jam ege mallume, nenio estis videbla, eĉ la propraj manoj. Ŝi ekmarŝis sur serpentumantan vojeton sub stellumo apenaŭ montranta vojsignon. Por savi sian fraton, ŝin timigis nek la vagantaj lupoj kaj malsataj tigroj, nek la baro de dornoj. Ŝi grimpis kaj grimpis supren. . . Je la unua tamburado* ŝi atingis la talion de la suda monto,

je la dua tamburado ŝi venis al la supro de la orienta monto; tiel ŝi daŭrigis la serĉadon tra la tria, kvara ĝis kvina tamburado, kiam venis la taglumo, sed la bovon ŝi tute ne trovis.

La ruĝa ĉemizo de Malgranda Hua disŝiriĝis de dornoj. Ŝiajn plandojn vundis la akraj ŝtontoj, kaj ŝi estis tute elĉerpita, spiregante ĉe ĉiu paŝo. . . Ĝuste tiam ŝi subite vidis dank' al la taglumo la bovon sin paŝanta sub iu montkrutaĵo. Tuj disfloris ŝia koro kaj ŝi pensis: "Nun mia frato estas savita!" Kaj per sia lasta energio ŝi rapidis al la bovo. Sed kiu ja atendis, ke ŝia subita alrapido surprizis la bovon kaj tiu forkuris nun antaŭ ŝi. La kompatinda knabino devis do denove postkuri ĝin intermonton post intermonto, kaj krutajon post krutaĵo streĉante ĝismorte sian forton. Finfine ŝi atingis la bovon kaj ekkaptis firme ĝian voston kvazaŭ la vivon de sia frato. Ĝuste tiam, Malgranda Hua eksentis varmegon en la brusto, kaj elvomis tuj plenbuŝon da freŝa sango. . . ŝi falis teren.

Aliflanke, batinte Malgrandan Xia-n ĝis duonmorto, la bienulo foriris endormiĝi post noktomezo. Spite de la dolorego sur sia tuta korpo, Malgranda Xia zorgante tutkore nur pri sia fratino, mordrompis la lig-ŝnuron per sia tuta forto kaj ŝtele hejmen forkuris. Sed tie li trovis la pordon ŝlosita. La fratino forestis. Li tuj sin turnis kaj direktis sur la monton.

Sed kiel li povus trovi sur la monto eĉ la ombron de sia fratino. Li vane serĉadis ĝis la tagiĝo, kiam li venis al la supro de la orienta monto, subite ekaŭdis la voĉon de sia fratino: "Fraĉjo, jen estas la bovo! Fraĉjo, jen estas la bovo!"

Li serĉis laŭ la direkto de la voĉo kaj fine trovis la bovon, kiu ekvidinte lin tute ne sin movis sed nur blekis. Iom observinte, li trovis ke la vosto de la bovo estis firme ĉirkaŭvolvita per sennombraj brakoj de rampanta kreskaĵo, sur kiuj floris multaj trumpetformaj ruĝaj floretoj. Tiutempe, el la malgrandaj trumpetoj estis aŭdebla denove la voĉo de la fratino: "Fraĉjo, mizera fraĉjo, fortiru tuj la bovon kaj rifuĝu for!"

Laŭ la rampanta kreskaĵo li serĉadis malsupren, kaj trovis, ke la rampanta kreskaĵo radikas en sanglageto, apud kiu kuŝas la kadavro de lia fratino. Korrompita, malgranda Xia ekploreis klinante sin

* La noktogardisto kvinfoje tamburas dum la tuta nokto, el kio oni povas eksci la tempon.



Ilustris Ma Guo-xun

sur la mortintan fratinon. Tiam el la malgrandaj ruĝaj floretoj denove aŭdiĝis la voĉo de la fratino: "Fraĉjo, forkuru rapide, venas la malamiko!"

Levante la kapon li vidis ke vere de la montpiedo iu alrajdis sur ĉevalo. Li salte stariĝis kaj forkuris al la okcidenta monto tirante la bovon.

La bienulo jam rimarkis Malgrandan Xia-n kaj spronante la ĉevalon lin persekutis de la

orienta monto ĝis la okcidenta, de la montpiedo ĝis la montosupro, kaj fine kaptis la kompatindan knabon. La kruelega bienulo lin vipadis kaj insultis: "Ĉu perdiĝis la bovo, ja nur vi, mizerulido ĝin kaŝis por akiri monon!" Kompatinda Malgranda Xia tiel ekmortis mizere sub la torturado.

Post la morto de Malgranda Xia, la bienulo rajdis sur la ĉevalo malsupren tirante kun si la bovon tute kontente. Li paŝis intermonton post intermonto, krutajon post krutajo, kaj fine alvenis ĉe iu profunda intermonta pasejo. Li ektrovis antaŭ siaj okuloj amason da bluaj floroj. Kaj ties volvantaj trunketoj subite ĉirkaŭligis firme la piedojn de la bovo kaj ĉevalo. La bienulo vipis jen la bovon jen la ĉevalon sed li ne povis irigi ilin. Li kolere desaltis, intencante fortranĉi la rampantajojn, sed antaŭ ol li eltiris la glavon, liaj manoj kaj piedoj estis ankaŭ ĉirkaŭligitaj de la volvantaj trunketoj. Timigite kaj volante sin liberigi la bienulo kun tuta forto sin retiris malantaŭen. Sed subite la rampa kreskajo disvolvis siajn trunketojn, kaj la bienulo, ne povante sin ekvilibrigi falis ruliĝante en la intermonton kaj frapegiĝis en karnomaso sur la fundajo.

De post tio, ĉie sur la monto floras ruĝaj kaj bluaj konvolvuloj kiuj kovris la monton senfloran. La tieaj loĝantoj nomis ilin bovtira floro. Kiam ili kolektas brulaĵojn sur la monto, ili ĉiam rememoras la kompatindan morton de la malgrandaj gefratoj, kaj la merititan finon de la kruela bienulo.

VENIS TEMPO POR ARANĜI EKONOMIAN E-REUVON

Kun rapidaj paŝoj antaŭiĝas la ekonomio de la socialismaj landoj, pro tio estas necese iamaniere respeguligi grandajn atingajojn de nia ekonomia vivo. Kreado de la ekonomia revuo, eldonata en lingvo Esperanto, kio faciligus eldonon de supre nomita revuo—estus la plej bona solvo de la problemo priskribi niajn sukcesojn. En ĉi-tia revuo oni povus presi ne nur artikolojn de ekonomistoj-esperantistoj, sed ankaŭ la mallongajn enhavojn de la artikoloj, presitaj en aliaj ne-esperantaj revuoj kaj gazetoj, krome enhavon de la anoncoj kaj aliajn materialojn el alilandaj ekonomiaj revuoj ktp. Viaj proponoj pri enhavo kaj pri eldonmaniero de la revuo sendu laŭ mia adreso: USSR. Moskvo G-21, str. Lev Tolstoj domo 5/1, loĝejo 68, al V.

Beŝenkovskij, aŭ laŭ mia "Fajrero-adreso": USSR. Moskvo K-9, P. O. Kesto 1253, "Fajrero" al V. Beŝenkovskij.

"PENTRAĴOJ KAJ SKULPTAĴOJ EL VIETNAMIO"

Belarta kolekto kun Esperantaj tekstoj

Mendu ĉe:

Vietnama Pacdefenda Esperantista Asocio

Prezo: 20 rubloj—3 dolaroj—I sterlingo 25—123 frankoj. ATENTU: La Vietnama Pacdefenda Esperantista Asocio interŝanĝas tiun ĉi interesan kaj belan eldonajon kontraŭ esperantlingvaj literaturajoj kaj Esp. Plenaj Vortaroj je ĉiu kvanto samekosta.

Skribu al: **VPEA, 15 Tô-hièn-Thanh,
Hanoj, Vietnamio (via USSR)**

Feng Mu:

DISFLORADO SUR LA PEKINA

La Teatro—Flora Bedo

Kiel flora bedo buntas ĉijare la teatra scenejo de Pekino, la centro de ĉinaj teatroj. Novaj kaj bonaj teatraĵoj konkurence aperadas, ke oni apenaŭ povas sekvi la disfloradon.

En la ĉefurbo estas pli ol 50 teatroj kaj teatraĵtrupoj, ĉu grandaj ĉu malgrandaj. Ili prezentas dramon kaj kvin specojn de operoj. Kaj meze de junio, alvenas al Pekino, pliaj ok lokaj operotrupoj el Ŝanhajo, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, kaj provincoj Zhejiang, Henan, Hubei, Hunan kaj Fujian. Nekalkuleblaj estis la nove kreitaj dramoj kaj la tradiciaj renovigitaj. Nur la popolaj profesiaj teatraĵtrupoj en Pekino kreis kaj prezentis entute 82 novajn teatraĵojn en la daŭro de marto ĝis junio ĉijare, preskaŭ ĉiutage aperas unu nova dramo. Se oni enkalkulas tiujn de la ŝtataj teatroj kaj de alilokaj teatraĵtrupoj, ili sumiĝas eĉ pli ol duoblo de la nombro.

Turno-punkto

Ĉu la tradicia artformo de klasikaj dramoj taŭgas por prezenti modernan temon—tio estas ne solvita problemo pridiskutata jam de 30-40 jaroj. Pluraj veteranaj artistoj famkonataj multe penadis tiudirekte, sed ĉiam baris al ili la

konflikto inter la formo kaj enhavo. Tial, iuj dramistoj konkludis, ke la klasika opero, kiel Kunĉju kaj Pekina Opero taŭgas nur por prezenti antikvan vivon. Kaj prezentado de moderna vivo per klasika opero estis konsiderata kiel vojo

netrairebla siatempe. Post la liberiĝo, rekomenciĝis provado en tiu direkto. Sed nur en tre limigita skalo. Tamen, ekde la pasinta printempo, dank' al grandioza rektifa kampanjo, ĉies penso estas plene liberigita, kaj en la sfero de teatrarto grandan salton oni faris por "tiri novon el la malnovo." La Ĉina Teatro de Pekina Opero kaj la Yan-ming Teatra Trupo de Pekina Opero la unuaj prezentis la dramon "La Blankharulino" en formo de la klasika opero, kaj rikolti aplaŭdon ĉe la publiko. Poste la Pekina Teatra Trupo de Pekina Opero ankaŭ prezentis en formo de la klasika Pekina opero la dramon "Kapto de Bandito Monta Aglo". Oni uzis la formon de interbatalo de la klasika opero por prezenti batalon inter liberigaj armeanoj kaj la banditoj. Tio estis nova iniciato, kaj la prezentado montriĝis tute harmonia kaj plena de freŝeco. Kaj la Xinxing Teatra Trupo de Pekina Opero, kiu ĉefe prezentas longajn daŭrigatajn dramojn karakterizatajn per artifika dekoracio, ankaŭ prezentas "Novaj Herooj kaj Heroinoj" en 4 sinsekvaj partoj. Ĝi surscenigas la batalojn surakvajn kaj surterajn de ĉinaj geriloj en centra Hebei-pro-

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

AŬTO- KAJ TRAKTOR- FABRIKADO


La nove fondita aŭto-industrio en Ĉinio nun bele disfloras kaj ĉiuflanke impetas. Laŭ informo aŭtoritata nur en la pasintaj kelkaj monatoj de la kuranta

Novaj produktaĵoj de la 1-a Aŭto-fabrika


Dekstre: Aŭtomobilo "Orienta Vento"

Sube maldekstre: Triaksa kam-para ŝarĝaŭto

jaro jam 50 specoj de aŭto kaj 137 specoj de traktoro estis prove fabrikataj. Ĝis la fino de tiu ĉi jaro produktiĝos entute 20,000 aŭtoj kaj 40,000 traktoroj. Ĉiuj tiuj aŭtoj kaj traktoroj estis projektitaj laŭ la realaj kondiĉoj



en Ĉinio, por utiligi diversajn hejtajn produktaĵojn en la lando. Kaj la kapablecoj kaj formoj de iuj el ili jam estas atingintaj la internacian nivelon.



vinco kontraŭ la japanaj invadistoj. Kaj same ĝi rikoltis grandan sukceson per la aventuraj kaj emociigaj scenoj. Per Pingĝju, kiu ĉefe estas ludata en moderna kostumo, la Ĉina Pingĝju Teatro prezentis laŭvice ankaŭ novajn dramojn priskribintajn vivon en nuntempo, kiel "Sanliwanvilaĝo", "Por esti ruĝa" k.t.p. Ĉjuĝju estas novnaskita teatra formo depost la liberiĝo, despli facile adaptebla por prezenti modernajn teatraĵojn. Tial en tiu periodo la modernaj temoj fariĝas la ĉefa fluo sur la scenejoj de la teatroj de klasikaj operoj.

Ĝuste en la monatoj majo kaj junio, alvenis al Pekino teatraj trupoj el diversaj lokoj. Plejparto el ilia repertuaro estis novaj modernaj teatraĵoj kaj verkitaj en la lastaj unu aŭ du monatoj. La prezentado de tiaj teatraĵoj formis vere bildon de printempa ĝardeno, kie konkurence kreskas novaj branĉetoj kaj florbuloj. Por la lastaj kelkdek jaroj neniam aperis tia prospero sur ĉina opera scenejo. Kaj tiom pli estas tute senprecedence en ĉina teatra historio, ke en mallonga tempo de unu aŭ du monatoj oni sukcesis surscenigi artisme aŭtentikajn homojn kaj heroaĵojn el reala vivo.

Oni povas tiel diri, ke nun la evoluo de la teatrarto jam venis al nova turno-punkto, ke ĉe la klasika opera arto okazas ŝanĝiĝo en kvalito—dramoj kun modernaj temoj fariĝas la ĉefa fluo, kaj tio malfermas al la kreado de novaj operoj larĝan perspektivon. Revoluciaj temoj el la lastaj cent jaroj estas nun vaste surscenigataj.

Ĉie, la Scenejoj

La alveno de la Teatra Trupo de Ĵueĝju de Hangzhou alportis novan atmosferon. Tiu ĉi trupo en kelkaj tagoj preparis plurajn mallongajn sed bonajn teatraĵojn, kiujn oni prezentis antaŭ



Sceno el "Familio"

Foto de Zheng Zhen-sun

la publiko sur Tian-anmen-placo antaŭ la Monumento de la Popolaj Herooj, tuj post sia alveno al la ĉefurbo.

Multaj teatraj trupoj tuj sekvis ĝian ekzemplon en mallongaj kelkaj tagoj kaj partoprenis la higienan kampanjon per prezentado de mallongaj teatraĵoj surstrate. Geaktoroj de la Kant-danca Trupo de Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio preparis sin por prezentado jam en la vagonaro survoje al la ĉefurbo, tiel ke ili dancis kaj kantis sur la stratoj tuj post la elvagoniĝo, donante al la ĉefurbo festan koloron.

Partoprenante la propagandon pri Ĝenerala Linio de Socialisma Konstruado teatraj trupoj venintaj el aliaj urboj ankaŭ faris surstratajn prezentojn post sia regula prezentado en teatroj. La famkonata aktorino Ding Shi-e el Ŝanhajo iris kune kun sia tuta trupo al la konstruejo de la Dektri-maŭzolea Akvokonservejo, kaj ludis en la tago de finkonstruiĝo de la granda digo, la teatraĵon speciale dediĉitan por laŭdi ĉi tiun grandiozan konstruadon.

Preskaŭ neniu teatra trupo en Pekino ne ludis sur la strato, aŭ sur iu konstruejo. Ili etendigis la scenejon sur la larĝajn stratojn kaj vastajn montarojn kaj kamparojn. La komuna prezentado de modern-temaj teatraĵoj kiu komenciĝis la 13-an de junio en Pekino, plue aldonis brilantajn kolorojn al la ĉina teatrarto.

Sceno el "Blankharulino", batalo kontraŭ bienulo Huang

Foto de Zheng Zhen-sun



Guo Jun:
Freskoj de Gu Guan

Freskoj de Gu Guan

ANTAŭ 18 jaroj Gu Yuan vivis en Nianzhuang-vilaĝo, Yan-an-gubernio, tiama ĉefurbo de la liberigita regiono. Tie la pentristo faris multajn lignogravuraĵojn, ekzemple “K-do Liu Zhidan”, “Libertempo de la Frato” kaj aliaj. Nun la pentristo denove ekvivas en la kamparo en Hebei-provinco. Krom partopreni en la kamparaj laboroj li kreis kelkdekojn da murpentraĵoj, per kiuj li donis grandan instigon al la kamparanoj en ilia impeto de la agrikultura produktado. Lasttempe oni kolektis 32 pecojn el ili kaj eldonis en libroformo. Tio estas nova rikolto en la artistaj rondoj.

En la granda impeto en la socialisma konstruado, inter la popoloj en Hebei-provinco ĉie aŭdiĝis la heroo devizo "faru nian naskiĝlokon freskoplena vilaĝo, gubernio, provinco." En multaj lokoj tia devizo estas jam efektivigita. Ekzemple en Huai-an-gubernio troviĝas jam 9990 freskoj, t. e. unu fresko por 5 familioj. Tia amasa artkreado ja estas vere senprecedenca. Sed kial disvastigi tian movadon en kamparo tra la tuta lando? Kiel la profesiaj artistoj partopreni tiun laboron por altiĝi la artan nivelon de la kamparanaj verkoj? jen estas problemoj urĝe solvendaj. La freskokreado de Gu Yuan donis ekzemplon por solvi tiun ĉi problemon. Kun plej granda entuziasmo li priprenis la realan vivon de nuna kamparo. Jen vidu! komenciĝas prospere la teknika kaj kultura

revolucioj en la kamparo. En unu el la freskoj li pentris kamparanon kondukantan drakon kun jena poemeto, simbolante la batalon kontraŭ naturo de la kamparanoj:

Kuras akvo monta,
Rampas riverflu'.
Bridas ĉion nia la instru'.
Supren! — diras ni,
Malen ne kuraĝas ĝi.
Iru! — diras ni,



Kyara Leciono

1. Nǐ zhīdào bù zhīdào shuǐ yǒu gāngbǐ? Zhè jǐge běnzi shì shuǐde? Nà jǐge xuéshēng dōu shì tāde xuéshēng ma? Nǐ yǒu gōngfu xiězi ma? Nà jǐge rén dōu shì shénme rén?
(*Ĉu vi scias, kiu havas plumon? Kies estas tiuj ĉi kajoroj? Ĉu tiuj lernantoj ĉiuj estas liaj? Ĉu vi havas tempon por skribi? Kiuj estas ĉiuj tiuj homoj?*)
2. Nǐ zuò shénme ne? Wǒ xiězi ne.
(*Kion vi faras? Mi skribas.*)
Nǐ xiěde shì shénme zì? Wǒ xiěde shì Zhōngguó zì.
(*Kiajn vortojn vi skribas? Kion mi skribas estas ĉinaj ideografiaĵoj.*)



*Stari ne kuraĝas ĝi.
Kaj laŭ nia la ordono
Donas ĝi elektroenerĝi'.*

La figuro de tiu pentraĵo donas firman kredon pri konkero de malfacilaĵoj kaj la naturo. Drako estas legenda besto familiara al la amaso jam de miloj da jaroj. Ĝia apero en la bildo donis al la rigardanto nenian senton disonancan kun la realo. La interesa bildo nur vekas optimisman humoron.

Liaj freskoj respegulas multeflanke la kamparanan vivon de kolektado de sterko ĝis elektrigo de la vilaĝoj, de batalo kontraŭ konservativismo ĝis stariĝo de komunisma agstilo. Preskaŭ en ĉiuj bildoj la pentristo kreis vivecan figuron. Oni sentas familiarecon en la figuroj de liaj pentraĵoj, ĉe kiuj konserviĝas la ornameco kaj karakterizaĵoj de la popola arto. Plie al ĉiu bildo la artisto aldonas surskribon en la formo de popolkanto. Tiel la tuta kolekto estas vere kolekto de idiliaj bildoj kaj poemoj. Mi citu alian el ili ĉi-sube:

*Jen verda arbar', jen florĝardeno,
Nia hejm' plej belas en la mond'.*



*Nek sabla vento nek sekeco,
Ĉielskrapas jare grena mont'.*

La poemoj kaj bildoj reliefe prezentas la deziron de la kamparanoj. El tiu ĉi kolekto la legantoj povas ne nur ĝui la novan verkon de Gu Yuan, sed ankaŭ rimarki la grandan ŝanĝon en la ĉina kamparo.



Nǐ huì xiě duōshǎo Zhōngguó zì? Wǒ huì xiě yìqiān wǔbǎi ge Zhōngguó zì.
(Kiom da ĉinaj ideografiaĵoj vi scipovas skribi? Mi scipovas skribi mil kvincent ĉinajn ideografiaĵojn.)

3. Nǐ dōu huì zuò shénme? Wǒ huì dú-shū, xiě-zì, shuō-huà.
(Kion vi entute povas fari? Mi povas legi, skribi kaj paroli.)

4. Nǐ dú dì-jǐ kè ne? Wǒ dú dì-èr kè ne.
(Kioman lecionon vi legas? Mi legas la duan.)
Nǐ dúle jǐ-kè le? Wǒ dúle liǎng-kè le.
(Kiom da lecionoj vi (jam) legis? Mi jam legis du lecionojn.)

5. Xuéshēng zuò shénme ne? Xuéshēng nian-shū ne.
(Kion la lernantoj faras? La lernantoj legas.)
Gōnggrén hé nóngmín zuò shénme ne? Tāmen gōngzuo, yě xuéxí.
(Kion faras la laboristoj kaj kamparanoj? Ili laboras kaj ankaŭ lernas.)

6. Yíge xuéshēng yǒu liǎng-zhī qiānbǐ shí-èr ge xuéshēng yǒu duōshǎo qiānbǐ?
(Ĉiu lernanto havas du kraĵonojn, kiom da kraĵonoj havas dek du lernantoj?)

7. Zhèli yǒu duōshǎo qiānbǐ? Zhèli yǒu shíwū-zhī qiānbǐ.
(Kiom da kraĵonoj estas ĉi tie? Ĉi tie estas dek kvin kraĵonoj.)

Qízhōng jǐ-zhī shì nǐde, jǐ-zhī shì tāde?
(Kiom el ili estas viaj, kiom estas liaj?)

8. Nǐ mǎi shénme? Wǒ mǎi zhuōzi, yǐzi, dèngzi.
(Kion vi aĉetas? Mi aĉetas tablon, seĝon kaj benkon.)

Tā mǎi shénme ne? Tā shénme yě bù mǎi.
(Kion li aĉetas? Li aĉetas nenion.)

9. Nǐ zhǎo shuǐ? Wǒ shuǐ yě bù zhǎo.
(Kiun vi serĉas? Mi serĉas nenium.)

GRAMATIKO

I. Unu el la specialaj karakterizaĵoj de ĉinaj verboj estas tio ke multaj el ili formiĝas per transitivaj verboj intime kunligitaj kun siaj objektoj en unu tuto, ekz., *xiězi* (2) fakte formiĝis el *xiě* (skribi) kaj *zi* (vorto), same: *dúshū* (legi-libro) *shuōhuà* (diri-parolaĵo) (3) *niànshū* (legi-libro) (5).

II. En parola Han-lingvo oni trovas specialajn sufiksojn ĉe certaj substantivoj, ekz., *zi*, *tou*, (*e*)*r*, *chu*. En ĉi tiu leciono ni havas *zi*. La vorto *zi* mem signifas "filo". Kiel sufikso, "zi" perdas sian originan signifon, kaj prononciĝas en malpeza tono (8).

III. Adverbo *yě* (ankaŭ, eĉ), kiel ĉiu adverbo, estas metita antaŭ verbo aŭ adjektivo. Kiam ĝi apud-metiĝas post pronomojn *shuí* (kiu) kaj *shénme* (kio), ekz., *shuí yě* kaj *shénme yě* ĝi ekhavas emfazan signifon de senescepteco(8).

IV. Nombroj estas formataj preskaŭ tute same kiel en Esperanto, ekz.:

LAM de la malproksima antikveco, Taiwan estas teritorio de Ĉinio. Tion atestas la historio de pli ol mil jaroj. En la antikva epoko de Qin-kaj Han-dinastioj (221 a.k. — 220 p.k.) cirkulis jam informo pri Taiwan. Ĝin menciis la Historio de Posta Han-dinastio (25-220 p.k.) La “Liuqiulando” priskribita en Historio de Sui-dinastio (581-618 p.k.) estis tiama nomo de Taiwan. En la jaro 607 p. K. iu oficiro nomata Zhu Kuan, kiu servis sub la reĝo Yangdi de Sui-dinastio alvenis al Taiwan, kaj la sekvintan jaron, speciala oficistaro estis instalita tie laŭ la ordono de la reĝo. Do pasis jam 1350 jaroj, de kiam venis al Taiwan ĉina oficistaro unuafoje. Post tio, tra Tang-dinastio, la Kvin Dinastioj, Song- kaj Yuan-dinastioj (t.e. de 618-1368 p.K.), multaj popolanoj seninterrompe transloĝiĝis en Taiwan-on el gubernioj de la suda Fujian-provinco. Kaŭze de tio, la lingvo, moro kaj vivkutimo de la popolo de Taiwan, krom tiuj de Gaoshan-nacio, estas tute samaj kiel tiuj de la kontinento ĝis nun.

En 1360 dum regado de Yuan-dinastio, oni starigis tie garnizonon kaj nomis “Xunjiansi”-on (estro de la garnizono), kiu instalis sin en Penghu por gardi kaj regi la insulojn Penghu kaj Taiwan. Per tio tiuj insuloj fariĝis oficiale parto de ĉina teritorio, kio okazis pli ol 400 jarojn antaŭ la sendependiĝo de Usono (1776).

Taiwan—Ĉina

De 1592 ĝis 1597, Tojotomi Hidejoŝi el Japanio multfoje invadis Koreion kaj la marbordojn de Ĉinio, la registaro de Ming-dinastio sendis trupojn por gardi Taiwan-on kaj Penghu-on kontraŭ la japanaj invadantoj.

En la 16-a jarcento, la portugaloj vojaĝis tra la markolo de Taiwan, ne mankis al ili ambicio al tiu trezora insulo, tamen ili nenion entreprenis. Nur ĝis la komenco de la 17-a jarcento (1622), nederlandanoj ekinvasis Penghu-on kaj parton de Taiwan. En la jaro 1624 Ming-registaro sukcesis reposedi Penghu-on per generalo Ju Zi-gao, kies trupoj venkis Nederlandajn invadintojn. Sed parto de la suda Taiwan estis ankoraŭ sub la okupado de nederlandanoj. Poste invadis ankaŭ hispanoj la nordan parton de la insulo, ĝis la jaro 1641, kiam la hispanoj venkite de la nederlandanoj, fuĝe forlasis siajn fortikajojn en Jilong kaj aliaj lokoj. Tio estis la unua fojo ke Taiwan falis en manojn de la imperiistoj.

Kiam la manĉuoj ekregis en Ĉinio, Zheng Cheng-gong decidis rezisti la manĉuojn kaj en



shí yī—11 èrshí—20 liùshí èr—62
jiùshí sān—93 yiqiān jiùbǎi èrshí bā—1928

Por montri nombron “du”, estas du vortoj: *liǎng* kaj *èr*. Oni diras en nombrado: *yī, èr, sān* . . .; por “du libroj, dek du kraĵonoj” oni diras *liǎng-běn shū, shí èr zhī qiānbì*. Por formi vicmontran numeralon, oni metas prefikson *dì* antaŭ la baza numeralo. Ĉe vicmontra numeralo estas uzata nur *èr* (4).

Numerala pronomo *jǐ* (vidu trian lecionon (6)) en parola lingvo havas sencon “kelke da”, ordinare malpli ol dek, kaj ĉiam estas akompanata de kalkula vorto (*běn, zhī* . . .).

La vorto *duōshǎo* estas formita el du kontraŭaj ideoj: *duō* (multa), *shǎo* (malmulta). Kune *duōshǎo* signifas “kiom da?”, kaj estas ĝenerale uzata sen kalkula vorto (6,7).

Vorto *duō* estas uzata ankaŭ por montri “pli”, kaj *shǎo* por montri “malpli”, ekz.: *duō 30 ge* (je 30 pli), *shǎo 30 ge* (je 30 malpli), *30 duo ge* signifas “pli ol 30”. Notu, ilia lokiĝo antaŭ aŭ post la numeralo diferencigas la signifon, ekz.: “Shao” post numeralo por montri “malpli” ne estas uzata.

Por “malpli ol 30” oni diras: *búdào 30 ge* (*bú=ne, dào=ĝis, bù* ŝanĝas sian tonon en *bú* ĉi tie).


VORTARO

bēnzi	kajero	bù	ne
dèngzi	benko	dì-	(prefikso montranta vicon)
dì-jǐ kè?	kioma leciono	dì-èr kè	dua leciono
dú	legi	dōu	ĉiuj, en-tute
duōshǎo?	kiom da?	dúle	legis
gāngbǐ	plumo	dúshū	legi
gōngfu	tempo por labori	ge	(kalkula vorto)
gōngzuò	labori	gōngrén	laboristo
huì	scipovi	hé	kaj
jǐ-kè?	kiom da lecionoj?	jǐge	kelkaj
-le	-is	jǐ-zhī?	kiom da?
liǎng-zhī	du	liǎng-kè	du lecionoj
mǎi	aĉeti	ma?	(demanda kelke da, vorto)
ne	(emfaza vorto)	nà	tiu

Teritorio

februaro (laŭ la luna kalendaro) de la jaro 1661, komandante armeon el 25,000 homoj li per militistoj atakis kaj reokupis Taiwan-on, post kelkmonata batalado. La nederlandanoj estis tute forpelitaj el la insulo, tiel finiĝis la 38-jara regado fremdula. Post kiam Zheng Cheng-gong liberigis Taiwan-on la loĝantoj ĉe la marbordoj de la kontinento kiuj volonte lin sekvis en batalo kontraŭ Qing-registaro, unuj post la aliaj iris trans la maron al Taiwan. Tio ebligis, ke Taiwan en la postaj jaroj sin disvolvis grandskale en natur-ekspluatado. En 1683, Zheng Ke-shuang, la nepo de Zheng Cheng-gong kapitulacis al Qing-dinastio, kaj Taiwan de tiam fariĝis ĝia teritorio.

Pli ol 200 jarojn Qing-dinastio regis Taiwan ĝis kiam post la Ĉina-Japana Milito (1894) estis subskribita la Traktato de Ŝimonoseki en 1895, kaj per tio Taiwan estis koncesiita al Japanio. Pro tio ĝi fariĝis denove kolonio de la imperiismo. Dum la 50 jaroj sub la japana regado, la popolo de Taiwan ne volante submetiĝis al ĝia regado bataladis heroe kontraŭ la okupanta armeo de



Japanio, sole de 1897 ĝis 1902, la nombro de arestitaj kontraŭ-japanaj patriotoj en Taiwan atingis 8030, el kiuj 3743 estis ekzekutitaj.

Kun la venko de la kontraŭ-japana rezista milito 1945, ĉiuj partoj de nia teritorio ceditaj kaj okupitaj de Japanio revenis en la sinon de la patrolando. La 1-an de dec. 1943, la tri landoj Ĉinio, Britio kaj Usono deklaris en la Kairo-deklaro: “Ni tri grandaj aliancaj landoj militas ĉifoje por deteni Japanion kaj puni ĝin pro la invado. La tri landoj tute ne celas profiton por si mem, nek al ekspansio de sia teritorio. La celo de la tri landoj estas senigi Japanion je ĝiaj milite akiritaj aŭ okupitaj insuloj en la Pacifika Oceano de post 1914 de la komenciĝo de la Unua Mondmilito kaj devigi Japanion redoni al Ĉinio la forrabitan de ĝi teritorion, nome Manĉurio, Taiwan, Penghu-a Insularo k. a. La Oka Artikolo de Potsdam-deklaro, publikita la 26-an de julio 1945 de la tri landoj Ĉinio, Usono kaj Britio por rapidigi kapitulacon de Japanio plie difinis, ke “La kondiĉoj de Kairo-deklaro estos nepre plenumataj”. En septembro de 1945, Japanio kapitulacis, la 25-an de oktobro de la sama jaro, Ĉinio akceptis la kapitulacon de Ando Rikiĉi, la tiama komandanto de la Japana 10a-flanka Armeo kaj ĝenerala gubernatoro de Taiwan. Depost tiu tempo, la teritoria rajto de Taiwan fine revenis al Ĉinio.

En aŭgusto de 1948, la Ŝtata Departemento de Usono rekonis en sia Blankkovrila Libro "Pri la Rilatoj inter Ĉinio kaj Usono", ke "Taiwan devas

niànsǔ	legi	nǐ	vi
qiānbì	krajono	nǐde	via
rén	homo	qízhōng	el tiuj, interalie
shì	esti	shénme	kia, kio
shíwǔ-zhī	dek kvin	shí-èr-ge	dek du
shuǐde?	kies?	shuí?	kio?
tāde	lia	shuōhuà	paroli
wǒ	mi	tāmen	ili
xiě	skribi	wǔbǎi	kvincent
xiězi	skribi	xiěde	tio, kion. . . skribas
yě	ankaŭ, eĉ	xuéshēng	lernanto
yìqiān	unu mil	xuéxí	lerni
yǒu	havi	yí-ge	unu
zhè	tiu ĉi	yǐzi	seĝo
zhīdào	scii	zhǎo	serĉi
zhuōzi	tablo	zhèli	ĉi tie
zhī	(kalkula vorto por vergforma objekto)	Zhōngguó	Ĉinio, ĉina
zuò	fari	zì	vorto, ideografiaĵo

Tom

esti redonita al Ĉinio". La 23-an de decembro 1949, ĝi denove rekonis en siaj propagandaj instrukcioj de la Politiko pri Taiwan ke "Taiwan estas ĉiurilate parto de Ĉinio, politike, geografie kaj strategie". La 5-an de januaro de 1950, Truman, la Usona prezidanto publikis deklaron dirante, ke Usono "rekonas la praktikadon de sia suvereneco de Ĉinio super la insulo (Taiwan)". La 9-an de februaro de la sama jaro, la Ŝtata Departemento de Usono en sia respondo al la Komitato de Eksteraj Aferoj de la Domo de Reprezentantoj pri la problemoj de Taiwan

rekonis, ke jam de la jaro 1945, "Taiwan estis inkluzivita en Ĉinio kiel provinco".

Nun, la Usona imperiismo ignorante la historiajn faktojn, malobservante la internacian interkonsenton kaj sian propran internacian devon, invadis kaj okupadas nian teritorion Taiwan, Penghu-on, kaj aliajn apudmarbordajn insulojn, en trudis sin en la internan aferon de Ĉinio kaj faras militan provokon. Tio ja estas absolute netolerebla por la ĉina popolo, kiu kun decidemo liberigos tiujn insulojn kaj frakasos la invadon fare de la Usona imperiismo.

Esperantisto inter Kamparanoj

Karaj kamaradoj:

Pardonu min, ke mi ne povis skribi al vi pli frue. Ni estas ege okupataj en la agrikultura produktado. Ĉiutage ni dormas nur ĉirkaŭ 6 horojn.

Du kamaradoj kaj mi loĝas kune en la hejmo de unu kamparano, sed ne manĝas samloke: la kamarado el hindilingva fako kaj mi en la hejmo de la produkta grupestro; la cetera kamarado en la hejmo de la vicgrupestro. La vivo inter la kamparanoj estas tre ĝojiga kaj signifplena. En la urbo, ni intelektuloj kutimas troalte taksi nin, opiniante, ke ni estas posedantoj de scioj. Sed, en la produkta praktiko ni tuj sentas, ke scioj al ni tre mankas. Fiereco, troa memfido kaj ceteraj difektoj propraj de la intelektuloj tute ne estas troveblaj en la kamparanoj (nature, mi diras pri la malriĉaj kamparanoj). Ili multe laboras, sed neniam laŭte krias pri sia merito. Pri socialismo, ili havas plenan esperon kaj konfidon, ĉar, travivinte sufiĉe la mizeron en la malnova socio, ili klare vidas, ke nur la socialisma vojo estas la plej ĝusta por ilin konduki al feliĉo kaj riĉa vivo. Ĝuste pro tio, ilia politika pozicio estas la plej firma kiel tiu de la laboristoj.

Ni multe lernas de la kamparanoj: la diligentecon, kuraĝecon, sparemon, amon al la Partio kaj la kooperativo. Nuntempe, ilia kultura nivelo ankoraŭ restas malalta. Tamen ili forte deziras ŝanĝi tian staton. Unu el niaj devoj estas do helpi ilin tiuflanke. Ni instruas ilin legi, skribi kaj kanti. Krome, mi helpas la laboron de la librotenisto de nia produkta grupo. Kun mia helpo, unu junulo jam ellernis la fonetikan alfabeton de la ĉina lingvo. Kelkaj eĉ scipovas

paroli iujn vortojn Esperantajn, ekz. "bovo", "kamarado", "sendi sterkon" ktp. La kamparanoj montriĝas lertaj en lernado de fremda lingvo. Multaj el la urbanoj ne scias prononci la sonon "R", sed la kamparanoj bone ĝin prononcas. Tio estas mirinda, ĉu ne?

Krom la ĉiutaga produkta laboro, ni faras ankaŭ sociajn laborojn. Mi estas helpanto de nia produkta grupestro kaj membro de la komitato por likvido de analfabetismo. Mia alia tasko estas instrui al la kamparanoj almenaŭ unu kanton po-monate.

La kamparanoj min traktas kiel siajn familiaĵojn. Ilia amika zorgo pri nia vivo estas tre kortuŝa. Pro tio ni ĝoje vivas en tiu granda familia rondo.

La 11-an de majo mi havis la honoron esti elektita labor-modelo, kune kun aliaj 7 novaj kooperativanoj venintaj el Pekino. Ni ricevis materialan premion.

Mi tre bedaŭras, ke mi provizore ne povas min dediĉi al Esperantaj laboroj. Ankoraŭ ne estas tempo instrui al la kamparanoj Esperanton, ĉar tio kion ili plej urĝe bezonas estas lerni legi kaj skribi la ĉinan lingvon. Tamen, malgraŭ tio, mi propagandos inter ili la verdan lingvon laŭ mia eblo. Mi kredas, ke la verdaj semoj, kiujn mi dissemas ĉi tie ne sekiĝos kaj iam ĝermos en la estonteĉo.

Tiun ĉi leteron mi skribis dum preskaŭ tuta monato. Nun mi finas. Esperante aŭdi de vi, mi tutkore salutas vin.

Yang Yongsen

ESPERANTO EN ĈINIO

EKSKURSO KUN HUNGARA AMIKO

La 21-an de sept. ekskursis al Beihai-parko Pekinaj geesperantistoj. Partoprenis ankaŭ hungara esp-isto J. Kiraly. Ili ĝuis belan veteron kaj bonhumoran babiladon. La hungara k-do multe rakontis pri siaj vojaĝoj kaj laborado en Brazilo, Turkio kaj multaj Eŭropaj landoj. En plejparto de la vizititaj landoj li interrilatiĝis kun esp-istoj kaj multe profitis el la Esp-scio en sia laboro kaj restado en fremdaj landoj. Lia bonhumora rakontado vekis ofte rid-eksplodojn ĉe la aŭskultantoj, kiuj tre ĝojis pro lia ĉeesto.

ĈINA ESP-ISTO RICEVIS HUNGARAN ORDENON

La Ordenon de Laboro de Hungara Popola Respubliko ricevis la 17an de julio ĉina esp-isto Sun Jung, kies merito estas tradukado el hungara literaturo en la ĉinan grandparte pere de

Esp-o. La transdonon de la ordeno faris mem Prezidanto Dobi Istvan en la Parlamenta Domo. La bildo montras la Prezidanton kaj k-don Sun Jung en tosto.

Inter la tradukadoj de Sun Jung estas ankaŭ "Johano la Brava" el Esp-a traduko de K. Kalocsay. En sia vojaĝo en Hungario, Sun Jung havis agrablan renkontiĝon kun la Esp-a tradukinto kaj J. Baghy kaj aliaj hungaraj esp-istoj.

ARTIKOLO PRI ESP.

En la 16-a kaj 17-a numero de Monda Kulturo, la plej malnova dumonata ĉinlingva revuo pri internaciaj aferoj, aperis longa artikolo "Pekino-Moskvo-Sofio-Varna" de k-do Chen Yuan, kiu partoprenis la 33-an Bulgaran Kongreson en Varna. En formo de tagnotoj, k-do Chen Yuan detale skribis en tiu ĉi artikolo la travivaĵojn dum la vojaĝo, la agadojn de la kongreso kaj liajn impresojn pri ĝi.

K-DO N. V. KINH NIN HONORIS

Je la 18-a de aŭgusto K-do N. V. Kinh, vietnama ambasadoro en Sovetio nin honoris per vizito al nia ligo okaze de sia vojaĝo al Moskvo. Li longe parolis kun laborantoj de ĈEL. Valorajn konsilojn li donis pri niaj laboroj kaj intersanĝis opiniojn pri la kunlaboro inter la vietnamaj kaj ĉinaj esperantistoj.

POLA ESPERANTISTO EN ĈINIO

S-ano Ziomek, membro kaj filia prezidanto de Pola-Ĉina Amikeca Asocio, antaŭ-nelonge vizitis Ĉinion kaj partoprenis nian nacian feston je la unua de oktobro. Je la sesa li kune kun sia amiko vizitis ankaŭ nian ligan kaj transdonis la saluton de polaj esperantistoj kaj inviton al ĉinaj esp-istoj partopreni la kongreson en Varsovio por celebri la Zamenhofan jubileon, donacis al ni krom aliaj memorindaĵoj ankaŭ la libron "Poeziaĵoj de Julian Tuwim".

NOVAJ ESPERANTAJ LIBROJ

Ĵus eldoniĝis 168-paĝa unua volumo de nova Esperanto-lernolibro por komencantoj. Ĝi estas kompilita de K-do Venlo Fon, kontrolita de ĈEL kaj eldonita de Komerca Presejo. Troviĝas en tiu ĉi volumo entute 16 lecionoj pri fundamentaj scioj de Esperanto kaj kun detalaj klarigoj en ĉina lingvo. Ĝia dua volumo estas kompilita, kaj eldoniĝos espereble en la komenco de la venonta jaro. Sekve de "Lerta Virineto" alia bildo-libro "Mi Volis Viziti Lernejon" klarigita per Esperanto baldaŭ eldoniĝos.



Prezidanto Dobi Istvan (maldekstre) kaj
K-do Sun Jung (dekstre)



Korespondi Deziras

***Andrej Sidorov**, USSR, Ĉerkassy obl., ul. B. Ĥmelnickogo 80, por traduko nacilingven deziras interŝanĝi mallongajn literaturaĵojn, fabelojn, humorajojn, historiajn anekdotojn ktp.

***Petro Poliŝĉuk**, USSR. Taŝkent, ul. Novo-Moskovskaja 18, kv. 15. deziras kor. kun seriozaj, spertaj esperantistoj, pri radia kaj televida tekniko, poezio, E-movado kaj pacmovado.

***Internacia Klubo de Palaco de Pioniroj**, Smolensk, USSR. deziras kor. kun lernantoj, pioniroj el Ĉinio kaj aliaj landoj, en Esperanto, rusa, angla, franca kaj germana.

***Krajnov S. N.** USSR. Moskvo 1-128, Otrádnioje 45/2, kv. 2., tre

bezonas diversajn propagandajn materialojn: faktoj, statistikaj ciferoj, informoj pri tradukoj de klasikaj verkoj, opinioj kaj deklaroj de famaj personoj, societoj kaj partioj pri Esperanto.

***Hubert Scherweit**, Mittweda Sa. Freyerstr. 11, Germanio.

***Alfred Mayer**, dez. interŝ. pm., Zepplinstr. 35, Karlsruhe-West (17a), Germanio-Okc.

***Kussinszky Kornél**, Pécs, Landler u. 19, Hungario, dez. kor. kun Ĉinio, Vietnamio, Japanio pri ĉiuj temoj, interŝ. pm., il. k., esperantaĵojn.

***S-ro Bánáti István kaj 31 gesanoj** dez. kor. kun tutmondo, interŝ. il. pk. Adr: Bánáti István,

BEKESCSABA, I. Bánát u. 26, Hungario.

***Jaromir Štechr**, PARDUBICE-DUKLA, MOSKEVSKA str. 2275, ĈSR; dez. kor. kun orientaj landoj. 11-klasa meza lernejo "Na Spořilove", Pardubice, ĈSR.

***VERGNAUD-JOZE** (p de D), Francio, dez. interŝ. bil. k. kun ĉinaj esperantistoj.

***S-ro Seki Masao**, Asahi-maĉi Karacu-ŝi, Saga-ken, Japanio, dez. inters. pm.

Malnova numero de EPĈ dezirata

***KOMPLEZEMAJ LEGANTOJ** de "El Popola Ĉinio"! Iu via kamarado legas kaj kolektas sopire la belan revuon. Mankas al li la n-ro de marto, 1953. Ĉu iu estas preta ĝin havigi al li? Antaŭan dankon naj bondezirojn. Adr.: **K-do K. Ĉeri, C. P. 159, BIELLA (Verĉelli), Italujo.**

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

RIPOZEJO EN KOMERCEJOJ

En ĉiuj butikoj, bazaroj kaj magazenoj en Chongqing, Sichuan-provinco troviĝas nun ripozejo por la klientoj.

Kiam iu kliento venis, la komizo tuj afable lin akceptas kaj kondukas al la ripozejo, kie estas tabloj, seĝoj, boligita akvo kaj tagjurnaloj. Ĉe iuj estas eĉ cigaredoj kaj bombonoj sur la tabloj kun prezetikedo. La klientoj povas mem preni laŭvole metinte la pagon en keston. Kiam la kliento sidiĝis, la komizo informas al li kiajn novajn komercaĵojn ili havas kaj en kiu fako oni povas aĉeti la deziratajn objektojn. Kelkaj komizoj eĉ mem alportas la komercaĵojn al la ripozejo, kaj helpas lin elekti. Ĉe iu bazaro de legomoj, la gemaljunuloj kaj gravedaj virinoj bezonas nur resti en la ripozejo por ricevi la

deziratajn objektojn kiujn la specialaj komizoj elektas kaj aĉetas anstataŭ ili.

HOTELOJ POR PATRINOJ KUN INFANOJ

Vojaĝi kun infanoj estas ĉiam afero peniga por la patrinoj. Por faciligi tiujn patrinojn establiĝis antaŭ ne longe proksime al la orienta fervoja stacio en Tianjin Hotelo por Patrinoj kun Infanoj.

Troviĝas en tiu hotelo litoj por infanoj, lakitaj tukoj kaj lakto-botelo por suĉinfanoj. En la korto estas "Paradizo por la Infanoj", ekipita per diversaj ludiloj, bildolibroj k.t.p. Ĉiuj laboroj en la hotelo inkluzive la direktadon, librotenadon kaj zorgon al la klientoj estas plenumataj de virinoj. En la vendejo de la hotelo oni liveras krom kukojn, laktopulvorojn por

infanoj ankaŭ tualetaĵojn por virinoj. Krome oni preparas tuj establi infanrazejon en la hotelo.

La aranĝo plaĉas al la patrinoj, tial ĝi estas ĉiam plenplena de klientoj ekde sia fondiĝo en aŭgusto.

AEROPLANO FABRIKITA EN KOLEGIO

Je la 24-a de septembro flugis super Pekino tute nova aeroplano fabrikita de Pekina Aeronaŭtika Kolegio. Tiu ĉi aeroplano kun loko por 8 pasaĝeroj flugdistanco de 1072 km. kaj rapideco de 300 km. hore estas projektita kaj fabrikita tute de la studentoj kaj profesoroj de la kolegio en la daŭro de 100 tagoj, kiel rezulto de aplikado de la eduka principo: kunligo de la lernado kun produktado kaj laborado.

INDEKSO DE EPĈ 1958 (111)

GRAVA DOKUMENTO (1) 0.9%

Ĝenerala Linio por Nia Socialisma Konstruado	147
--	-----

EKONOMIAJ KOSTRUADOJ (26) 23.4%

Sur la Kampo	6
Konduki Akvon sur Monton	10
La Petrolminejo de Yumen dum ok jaroj	14
Rapida Transformiĝo	42
Bolas Entuziasmo	44
Bildo de Printempa Plugado	46
Industrio en la Montarojn	78
Tra Montoj trans Markolo al Xiamen	80
La Aspekto de Malnova Imperia Ĉasejo	82
Fekunda Gruzokampo	84
Post la Emeritiĝo	94
La Ses Grandaj Havenoj	114
Prospera Metiindustrio	117
Batalo kontraŭ Sabloventego	119
Nova Rekordo de la Somera Rikolto de Tritiko	127
Kunlaboro kontraŭ Erozio	128
Ili Estas Ordinaraĵoj Laboruloj	148
Maro da Saĝo	150
Plej Saĝas la Plej Plebaj	152
Torĉo sur la Ebenejo	154
Fišprodukto en Guangdong-provinco	156
Mirinda Rizprodukto	159
La Popola Komunumo	184
La Posteuloj de Gan Jiang	186
Kvar Knabinoj—Dek Fabrikoj	188
Juna Kreanto de Mirakloj	190

KULTURO, EDUKADO (6) 5.4%

Kial Fonetika Alfabeto de Han-lingvo?	70
Lernejo por Kulturi Kamparanajn Intelektulojn	84
Kurso de Ĉina Lingvo	100, 137, 208
Guan Han-qing Vaste Memorata en Ĉinio	117
La Kamparanoj Marŝas al la Kulturo	127
Universitato de Ruĝuloj kaj Specialistoj	157

POPOLA VIVO (12) 10.8%

Rektifa Kampanjo	4
Prezidanto Mao Legas Opiniaĵojn	5
Estu Klera Juna Kooperativano	8
Lando de Poezio	19
Ili Atendas Siajn Mastrojn	48
Riĉa Lando Bela Estonteco	54
Goxu	54
Sporto	88
La Naciminoritatoj en Ĉinio	90
Laboristo-poetoj	136
Transsalto Rekte al Socialismo	162
La Sekreto de Ujgura Maljunulo	192

LITERATURO, ARTO (27) (36) 32.4%

Vivo Laborema	12
Senvelkaj Floroj	19
Tri Poemoj de la Lasta Generacio	22
Du Poemoj de Du Fu	23
La Kajto	25
Kiel Kreiĝas la Ĉielo kaj la Tero	32
Ĉe Ni Ne Estas Vintro	39
Printempa zefiro	40
En la Placo de l'Ĉiela Trankvileco	52
Patrino kun Filo Serĉas la Sunon	56
Feriaj Tagoj en la Hejmvilaĝo	58
Deveno de la Fajro	66
Sigeligfarado kiel Arto	92
Sonĝo	93
Translokigo de Montoj	94
Dialogo kun Rivereto	105
Rakŝa Timas la Sunon	105
Kolektado de Popolkantoj	111
La Vento kaj Pluvo Kriegas	121
Pri Kunĉju-opero	122
Torĉo-festo	126
La Flava Gruo	134
Du Poemoj de Maŭ Ze-dung	164
Kelkaj Novaj Popolkantoj	164
Noto en Pekino	165
Avo Sun Qun-chang	168
Ĵuro	168

La Origino de la Homo	168
Tio Ne Estas Mia Afero	169
Knabo Vendanta Ĵurnalojn	190
Du Poemoj de Maŭ Ze-dung	198
Patrino Needziniĝinta	198
Kelkaj Novaj Popolkantoj	200
Proverboj el Tibeto	203
La Deveno de Konvolvulo	204
Disflorado sur Pekina Sceno	206

FUNDAMENTAJ SCIOJ (15) 13.5%

Kuriozaj Birdoj kaj Bestoj	19
Kabano de Du Fu	23
La Praepoko de Ĉinio	30
Kuriozaj de Shanxi-provinco	53
Shang-dinastio	64
Peonio	68
Peonioj de Luoyang	69
La Okcidenta Zhou-dinastio	102
La Epoko de Printempo kaj Aŭtuno	138
Novaj Poŝtmarkoj	145
La Militantaj Regnoj	160
La Ĉina Mezur-sistemo	170
Ĉinaj Antikvaj Pagodoj	172
Ĉina Kuirarto	104, 174
Taiwan, Nia Teritorio	210

AMIKECO, PACO (9) 8.1%

Apelo al la Tutmondaj Popoloj	3
Neforgesebla Hindio	16
Filmado kun Francaj Amikoj	50
Robeson Estas en Usono	50
Miaj Personaj Impresoj	97
Ŝvito por Amikeco	98
Rakonto pri Terpomoj	130
Amika Voĉo el Novzelando	176
Letero de Nia Hungara Amiko	176

PRI ESPERANTO K. A. (6) 5.4%

Nova Etapo de la Ĉina E-movado	34
Sur Nia Librobreto	106, 141
Esperanto-movado en Ĉinio	142
Novaj Poŝtmarkoj	143
Impresoj el Varna-kongreso	175
V. Eroŝenko—Rusa Amiko de Lu Sin	195
Kurantaj Aferoj (en ĉiu numero)	

Tuj Renovigu Vian Abonon!

Karaj legantoj! Via 1958-jara abono jam finiĝis ĉe la 6-a numero. Se vi volas daŭrigi la abonon, bonvolu tuj turni vin al vialandaj perantoj aŭ perantaj librejoj. En landoj, kie troviĝas nek nia peranto nek perantaj librejoj, la legantoj povas aboni nian revuon rekte ĉe nia administracio per respond-kuponoj (12 rk. por jarabono de 1959 aŭ egalvaloraj E-libroj.


Samtempe ni petas ĉiujn niajn perantojn tuj akcepti abonon de 1959. Por kelkaj landoj ankoraŭ ne troviĝas prezo de EPĈ en la prezo-listo, la peranto rajtas mem ĝin fiksi en sia lando laŭ la prezoj publikigitaj por aliaj landoj, sed ni petas lin nin informi post la fiksiĝo.

Oni povas aboni EPĈ-n ĉe jenaj librejoj

Albanio	Ndermarjes Shtetnore Botimeve, Tirana
Brazilo	Livraria das Bandeiras Ltda., Pea. da Republica, nr. 162-1 and Sao Paulo
Bulgario	RAZNOIZNOS, Assen 1, Street No 1, Sofia
Ĉ.S.R.	ORBIS, Stalin Nova 46, Prague 12
Hongkong	Sin Min Chu Publishing Co., 175 Queen's Road Central (jarabono: 3.00 HK\$)
Hungario	KULTURA, Budapest 62, P.O. Box 149
Izraelo	"Lotos" Ltd., Reh. Hakovshim 19/11, P.O.B. 4550, Tel Aviv "Sifriat Poalim", 73 Allenby Street, Tel Aviv "Lepac" Ltd., 20 Brenner St., P.O.B. 1136, Tel Aviv. "Halflepac" Ltd., Arlosorov St. 11, P.O.B. 1794, Haifa (jarabono: 1000 Prutt.)
Koreio	朝鮮, 平壤, 國際書店總店
Meksikio	Fondo de Cultura Popular, Avenida Hidalgo 75, Despacho 107, Apartado Postal 2352, Mexico D. F.
Nov-Zelando	Progressive Books Society, Ltd., 14-16 Darby Street, Auckland C 1
Pollando	ARS POLONA, Varsovio, ul Foksal 18
Rumanio	CARTIMEX, Bucharest, P.O. Box 134-135
Sirio	Omar Tonbakji, Rue Saad Allh Djabri, Damascus (jarabono: 150 pias)
Vietnamio	Phong Sach Bao Ngoai van, 22, Tràng Tiên, HANOI


Novaj Perantoj

Belgio	Belga Esperanto-Instituto, Oostenstraat 26, Antverpeno, Poŝtĉeko: No 1689.58 (jarabono: 60 BFr.)
Brazilo	Brazila Esperanto-Ligo, Praca da Republica, 54, 1o, Rio de Janeiro
Svedlando	Förlagsföreningen Esperanto Upa, Fack 7043, MALMO 7



MAŝINOJ KAJ VETURILOJ FARITAJ EN ĈINIO

Fotoj pri la Ekspozicio de Tutlandaj Industrio kaj Komunikado



1. Stalpremiloj
2. Maŝinfabrikiloj
3. Modelo de la konstruat
10000-tuna ŝipo
4. Veturiiloj
5. 80-ĉevalpova traktoro

